Reg.-felvett!

XIXa jaro. Nº 269 (1) ☆ Monata ☆ Januaro 1923

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

JARA ABONO

Simpla abono	10.— Fr. Sv.
Kun la membreco de UEA	12.50 Fr. Sv.
Unu numero	1.— Fr. Sv.

Svisa poŝtĉeko I. 2310. — La abonoj komenciĝas en januaro

REKLAMO

Anonco (unu centimetra kolonero)	2.— Fr. Sv.
Anonceto (1 linio: 10 vortoj)	0.50 Fr. Sv.
Korespondado (1 enskribo)	0.75 Fr. Sv.

Vidu naciajn prezojn en la koncerna fako!

FONDINTO: HECTOR HODLER
GVIDANTO: D-ro EDMOND PRIVAT
ADRESO DE LA REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO: 12, BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE
La Redaktejo ne povas resendi manuskriptojn. Lasta dato por ricevo: la 15e de ĉiu monato. Oni skribu tre legeble kaj konservu kopion.

TEKSTO.— *Dekmil membroj,* Edmond Privat. — *Komerca Konferenco en Venezia.* — *Por la ekzisto de UEA.* — *Alvoko al la IX-aj Internaciaj Floraj Ludoj.* — *Tra la fakoj.* — *Svisa Esperanto-Societo,* Alice Diekmann. — **Socia vivo:** *Protektado de Infanoj,* D-rino Marguerite Beck. — *Internacia Labora Oficejo.* — **Scienco:** *Pensoj.* — **Literaturo:** *La violono de Rotschild,* Anton Ĉeĥov. — *Vintra soneto,* Petro Stojan. — *La steloj,* Stevan Živanovič. — *Tra la libraro.* — **Esperantismo:** *XV-a Universala Kongreso de Esperanto.* — *Liberaj vortoj,* D-ro Orthal. — *Kroniko.* — *Ĉiujara kunveno de membroj kaj delegitoj de UEA en London.* — *Tra la filatelio.* — *Lingvaj Studoj.* — *Oficiala Informilo de UEA.* — *Esperantista Literatura Asocio.* — *Tra la Gazetaro.* — *Esperantista Parolejo.* — *Esperantista Vivo.* — *Niaj Mortintoj.* — *Redakteja Korespondo. Ŝako.* — *Reklamo.*

Insista peto al niaj legantoj. **La personoj ne dezirantaj renovigi sian abonon estas insiste petataj bonvoli resendi ĉi tiun n-ron tuj al nia administrejo. Ili ne forgesu noti sian adreson kiel sendinto.**

Dekmil membroj.

En Helsingfors la esperantistoj decidis bazi sian organizon sur du necesaj kolonoj: unuflanke la necesaj societoj, kiuj zorgas pri nacilingva propagando kaj instruado, aliflanke UEA, kiu fariĝis la oficiala grupiĝo tutmonda de l' individuaj esperantistoj por komunaj celoj kaj antaŭ ĉio por akceli la uzadon de nia lingvo.

Oficialeco estas bela afero, sed ĝi ne plenigas deficitajn truojn. Tion spertis tiu admirinda pioniro de Esperanto, generalo Sebert, kiu dum deksep jaroj devis pagi mem la elspezojn de la Centra Oficejo en Paris kun neforgesebla malavareco.

Nia movado estas unu el la plej vastaj en la mondo, se oni komparas ĝin kun ĉiuj aliaj. Tamen ĝi ankoraŭ ne sukcesis havigi al si potencan organizon per kotizoj. Ĝiaj fortoj estas tro dissemitaj. Se ili kunligiĝus iom discipline kaj eĉ iom komerce pri financaj aferoj, Esperanto posedus naciajn kaj internaciajn agilojn, kiuj povus ĵaluzigi la plej konatajn internaciajn movadojn.

Malgraŭ la fakto, ke la esperantistoj estas plejofte malriĉaj, ili sukcesas elspezi ĉiujare unu ĝis du milionojn da francaj frankoj por siaj universalaj kongresoj. Per tia sumo, kian propagandon oni povus fari! Sed ne ĉiuj, kiuj elspezas mil frankojn por vojaĝo donacus tiom al Esperanto-societo. Pro tio la teknikaj konferencoj estas oportuna utiligaĵo de psikologia fenomeno.

Tamen konstantaj organizaĵoj estas necesaj. Centra organo, centra adresaro, interrilata sistemo, komunaj agiloj, praktika plenumo de komuna volo, ĉio simila povas ekzisti nur per kotizoj. UEA havas 6.000 membrojn. Ĝi bezonas 10.000 por pagi siajn elspezojn kaj 15.000 por fariĝi potenca en la mondo. Ĉu tiuj estas eksterordinaraj ciferoj? Tute ne. Ekzistas multe pli da esperantistoj kaj inter ili estus facile trovi dekmil aliĝemajn al UEA eĉ nur en la bonvalutaj landoj. Je kio utilas kursoj, se la homoj ne restas poste interesataj al Esperanto per legado, korespondado kaj uzado? Kelkaj ŝatas partopreni en grupaj kunvenoj, sed tre multaj ne havas tempon. Tiujn oni nepre varbu por UEA por ilin konservi.

Same pri komercaj firmoj. Multaj aprobas la ideon de helplingvo sed prave rediras ke ili neniam ricevis leteron en Esperanto. Kial? Ĉar ili ne enskribiĝis sur adresaro. Ĉu oni telefonus al ili, se ilia nomo ne troviĝus en la telefonlibro? UEA presigas senpage la adresojn de ĉiuj aliĝintaj firmoj en sian jarlibron dissendatan po 6.000 ekzempleroj en la tutan mondon. Ĉu tio ne estas samtempe bonega reklamo? Ankaŭ ekzistas la anoncpaĝoj.

Ĉiu leganto de „Esperanto“ konas almenaŭ unu firmon aŭ hotelon en sia urbo. Kial ni ne promesas ke ni ĝin vizitos kaj proponos la aliĝon kiel entrepreno? Se la firmo ne havas esperantistan korespondanton, ĉu ni ne povus proponi nian helpon por traduki eventualajn korespondaĵojn?

Ĉar ni ĉiuj deziras altiri la atenton de komercistoj al nia afero dum tiu ĉi vintro, ni promesu provi la proponitan viziton. Se ĉiuj niaj membroj varbus po unu firmo preta regule pagi ĉiujare al nia Delegito sian kotizon, tio ne nur ebligus UEA vivi kaj efike labori, sed ĝi kreus veran komercan adresaron apud la alia kaj ĝi povus havi gravajn sekvojn por akceli la uzadon de Esperanto. Ĉu ni provu? Ni atendas viajn sesmil respondojn kun senpacienco.

Edmond Privat.

11
700.090 - F. Esp.
19
1923
269-280

Ni insiste petas niajn legantojn bonvoli tuj sendi al ni ilian realiĝon por 1923; tiel ili ebligos al ni fiksi la eldonciferon de la unuaj monatoj kaj ili estos certaj ke la sendo de la gazeto ne estos haltigata.

Komerca Konferenco en Venezia

1 — 4 Aprilo 1922.

PROVIZORA TAGORDO:

1. Spertoj pri Esperanto en Komerco.
2. Spertoj pri Esperanto en Foiroj.
3. Spertoj pri Esperanto en Turismo.
4. Rimedoj por efektivigi la rezolucion n-ro 2 de la Pariza Komerca Ĉambro (9 Februaro 1921) rekomendanta disvastigi la uzadon de Esperanto por plifaciligi komercajn rilatojn.
5. Internacia Komerca Adresaro per UEA.
6. Helplingvo por Senfadena Telefonio.

Por la ekzisto de UEA.

Brita Delegito skribas:

Mi zorge tralegis la Oficialan Bultenon kaj la raporto pri la financa stato de nia Asocio multe maltrankviligis min. Spite de la fakto, ke nuntempe multaj diabloj laŭ la formoj de impostoj, manko de laboro, malplenigitaj poŝoj ktp. fantomvizitas min, mi decidis realiĝi kiel Membro-Subtenanto. Sendube pro tio la sorto favoros min, kaj se ne, mi devos kaŝi min kiam la impostkolektisto alproksimiĝos. Preĝu por li kaj mi ankaŭ.

J. R. M. en St.

Germana Delegito skribas:

Mi konfirmas la ricevon de la Oficiala Bulteno kun la aldonaĵoj. Kvankam mia salajro kiel juna bankoficisto estas apenaŭ 40.000 Mark (ĉirkaŭ 30 svisaj frankoj) mi volonte pagas la ĝustan kotizon de Membro-Abonanto (4000 Mark). Ŝparante je fumaĵoj mi ĝoje povas servi nian aferon.

F. S. en D.

Finna Delegito atentigas (en „Esperanta Finnlando“ dum Oktobro 1922):

Se ni komparas la statistikon de la membroj, kiun la C.O. de UEA donas en sia raporto pri la jaro 1921, presita en la Kongresa Libro por la XIVa, kun tiu de la jaro 1920 prezentita en Praha, ni povas konstati tre ĝojigan progreson, kiu laŭ mia scio eĉ superas la esperojn, starigitajn en tiu rilato dum la antaŭa jaro. La tiam aspirita nombro de 5.000 membroj estas dum 1921 ne nur atingita, sed brile superita. La statistikoj nome montras, ke kontraŭ la 3.848 membroj en la fino de l'agadjaro 1920, en la lasta jaro 1921 povas montri staton de 5.554 membroj. La kresko do estis ne malpli ol 1.706 membroj, aŭ 44.3 procentoj.

Estas interese studi, kiel tiu kresko dividiĝas inter la diversaj landoj. Se ni kalkulas la relativan kreskon en procentoj aparte por ĉiuj landoj kaj ordigas ilin laŭlande, ni ricevos tre interesan tabelon. Pro simpleco ni konsideru nur la Eŭropajn landojn. Jen la tabelo:

	La membraro		La kresko		
	1920	1921	absoluta	relativa	
Rumanio	8	90	82	1.025.0	proc.
Jugoslavio	25	146	121	484.0	„
Litovio	7	22	15	214.3	„
Latvio	7	21	14	200.0	„
Bulgario	45	125	80	177.8	„
Saarteritorio	2	5	3	150.0	„
Danzig	7	17	10	142.9	„
Aŭstrio	43	103	60	139.5	„
Polio	131	312	181	138.2	„
Turkio	30	67	37	123.3	„
Estonio	17	36	19	111.8	„
Hungario	95	189	94	99.0	„
Ĉeĥoslovakio	323	535	212	65.6	„
Germanio	456	744	288	63.2	„
Italio	106	166	60	56.6	„
Svisio	125	190	65	52.0	„
Islando	2	3	1	50.0	„
Nederlando	160	233	73	45.6	„
Svedio	121	156	35	28.8	„
Francio	408	459	51	12.5	„
Ruslando	9	10	1	11.1	„
Britio	677	708	31	4.4	„

Ni trovas inter tiuj tutajn 11 landojn, kie la membronombro dum unu jaro pli ol duobliĝis. Samideanoj! Demetu la ĉapelojn! Poste sekvas 6 landoj, kie la kresko superis 50%. La absoluta kresko estis plej granda en Germanio, Ĉeĥoslovakio, Polio, Jugoslavio ktp.

Restas du landoj, kie la membraro en la pritraktataj jaroj restis neŝanĝita. Ili estas Norvegio kun 59 kaj Portugalio kun 4 membroj.

Sed . . .? Finnlando . . .? Mi vidas miajn samlandanojn mire demandantajn —. Ne, mi ne forgesis mian propran landon. Kun sama surprizo kaj honto, kiujn certe vi ĉiuj sentas, mi devas konstati, ke Finnlando ne estis envicigebla en la supre-notita landlisto. Kial? Mankas el la suprenomita listo 4 landoj, kie la membraro — malkreskis. Inter ili Finnlando! *Malkreskis!* En lando, kie la esperanta movado laŭdire bone progresas, kie la esperantistoj fervore kaj modele laboradas, kaj en la lando, kiun la tutmonda esperantistaro ĝuste dum tiu jaro konfidis kaj honoris, transdoninte al ĝi la plej noblan kaj fieran taskon, la aranĝadon de Universala Kongreso! Mi do devas kompletigi la liston:

	La membraro		La malkresko		
	1920	1921	absoluta	relativa	
Hispanio	193	191	2	1.0	proc.
Danio	71	70	1	1.4	„
Finnlando	148	144	4	2,7	„
Belgio	72	67	5	6.9	„

Do inter la 28 reprezentataj eŭropaj landoj la lando de la XIVa enviciĝis laŭorde rilate la progresado de UEA kiel la antaŭlasta. Laŭ sia membronombro Finnlando estis en 1920 laŭorde la 7a, en 1921 la 13a.

En la ekster-eŭropaj landoj la membraro sume kreskis de 495 dum 1920 ĝis 692 dum 1921, do per 197 membroj, aŭ 39.8 proc.

Mi ne serĉos la kaŭzojn, kiuj estigis la malkreskon de la membraro en nia lando. Nun estas demando pri tio, kiel savi la situacion en la nuna pasanta jaro. Unue: la C. O. de UEA sendis antaŭ kelka tempo al la Esperanto-Oficejo en Helsinki longan liston de malnovaj membroj ankoraŭ nepagintaj sian kotizaĵon por 1922 kaj pretajn repagilojn, per kiuj la Oficejo devos enkasigi la kotizojn. La repagiloj estas antaŭ kelkaj tagoj enpoŝtigitaj al la koncernaj membroj. Ni rajtas supozi ke neniu samideano en nia lando post la gloraj tagoj de la XIVa malatentos la ricevitan poŝtrepagilon. (Por 1922a jaro.)

TERR. NATIONALBIBLIOTHEK WIEN

Due: La XIVan ĉeestis pli ol 400 Finnlandaj samideanoj. Ĉu ĉiuj el ili en si ankaŭ ne sentas la postulon de daŭra solidareco kun egalaj rajtoj kaj egalaj *devoj* kontraŭ la centra organizaĵo de nia movado? Vi ja ĉiuj, la *neplenumintoj* de la devoj, egalmezure ĝuegis la kongresajn travivaĵojn kaj plezurojn kiel tiuj, kiuj fidele ĉiam oferis la postulatajn impostajn monerojn al tiuj organizaĵoj, sen kiuj nia movado nek la ĝuindaj ĉiujaraj mondfestoj povas okazi. Do, mi esperas, ke ĉiuj finnaj samideanoj, partoprenintaj en la ĝuoj, restu solidaraj en la devoj, sendante sian „elaĉetmonon" por UEA. Tiamaniere ankaŭ nia cifero duobliĝos, kaj ni de nia parto helpos al UEA atingi ĝian plej proksiman celon: 10.000 membrojn.

La Delegito en Helsinki.

Alvoko al la IXaj Internaciaj Floraj Ludoj.

„Kataluna Esperantisto" publikigis aldonon, kiu enhavas la kondiĉojn por partopreno en la ĉiujaraj Floraj Ludoj. Jen resumo:

Ekzistas 4 ordinaraj temoj: originala versaĵo kantanta amon, originala ama verko en prozo, du tradukoj el kataluna lingvo. Plie ekzistas 19 eksterordinaraj konkursoj ĉefe kun temo laŭvola. Aliaj devas trakti pri: Esperanto ĉe la Asocioj de Komercaj Komizoj; Ĉarmo de la muziko; Mutualismo; Versaĵo el du strofoj enhavantaj ĉiu 12 liniojn, adaptebla je muziko kaj taŭga kiel himno de la Societo „Nova Sento"; Severa Unueco, nepra kondiĉo de internacia lingvo.

La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Esperanto kaj ne ankoraŭ eldonitaj.

Al la manuskriptoj — kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 31a de januaro 1923 de la Sekretario S-ro Marian Solâ en la sidejo de la Kataluna Esperantista Federacio (Carme 30, Barcelona) — oni devas aldoni devizon kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

La laŭreato de la Ama verko ricevos la kutiman naturan floron kaj rajtos elekti la Reĝinon de la Festo okazonta en Manresa en aprilo.

La aŭtoroj de la 4 premiitaj ordinaraj temoj ricevos lukse binditan ekzempleron de la verko „Vivo de Zamenhof" de Edm. Privat. Krome oni donos belan diplomon al ĉiu laŭreato.

La premioj de la eksterordinaraj temoj estas artobjektoj aŭ sumoj de 25 ĝis 100 pesetas.

La manuskriptoj ne estos resendataj. La listo de la premiintoj aperos en „Kataluna Esperantisto" kaj en aliaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

TRA LA FAKOJ

Instruistoj.

„Novaj Tempoj" decidis aperigi kiel eble plej baldaŭ (eble Paske 1923) adresaron de edukistoj-esperantistoj. Tiu adresaro estos la plej grava ilo ebliganta la geinstruistojn internacie kaj efike labori. Ni ne forgesu ke la triumfon de Esperanto ni certigos per Lernejo t. e. per helpo de l' edukistoj. Jam „Novaj Tempoj" kolektis preskaŭ 1000 adresojn de ĉiulandaj kolegoj kaj ĝi insiste petas:

1. la sekretariojn de naciasocioj de esp. instruistoj sendi sian membroliston. Ĝi kompensos per senpaga sendo de l'adresaro internacia.

2. la izolitajn gekolegojn, kiuj ankoraŭ ne ricevis „Novaj Tempoj", komuniki sian adreson. Ili ricevos senpagan specimenon de la gazeto.

3. la needukistajn samideanojn tre interesataj pri la edukista demando, same informi. Iliaj nomoj estos grupigitaj fine de l' adresaro.

Adreso de „Novaj Tempoj": E. Vittecoq, Sassetot par Bacqueville (Seine Inférieure), Francio.

Svisa Esperanto-Societo.

Ĝenerala kunveno.

La S. E. S. okazigis ĝeneralan kunvenon la 10an de decembro en Restoracio „Karl der Grosse" en Zürich. 24 delegitoj reprezentis la 10 jenajn grupojn: Bern, Genève, Le Locle, Lyss, Montreux, Rorschach, St. Gallen, Zürich, Burgdorf, Grupo Zamenhof en Lausanne. Senkulpigis sin la grupoj de Neuchâtel, Chaux de Fonds, Lugano, Locarno, Basel. La membraro kreskis de 196 al 254.

S-ro Edm. Privat prezidis. Oni elektis kiel vic-prezidanton Prof. Eug. Müller el Zürich.

Laŭ la ricevitaj raportoj de la grupoj propagando estis farita per paroladoj, 23 kursoj por komencantoj, 5 perfektigaj, 1 supera en Universitato (Genève), 1 en komerca lernejo. Esperanto estas enkondukita en la sepgradaj klasoj en Genève. La Centra Komitato dissendis al la grupoj kaj izolaj membroj raporton pri la Konferenco „Esperanto en Lernejoj" kaj raporton de la Sekretariaro de la L. d. N. Aperis 2 lernolibroj, 1 franclingva de S-ro Edm. Privat, 1 germanlingva de S-ro J. Perlet.

La Kunveno reelektis kiel prezidanton S-ron Edm. Privat, kiel ĉefgrupon: Genève; decidis ke la kotizaĵoj de la grupoj restos samaj, sed ke la izoluloj pagos kotizaĵon de 4 fr. La proksima ĝenerala kunveno okazos aŭtune en Bern.

La ĝenerala kunveno rekomendas al la grupoj klopodi por sendi oficialan delegiton de komerca aŭ turista institucio al la Komerca Konferenco en Venezia. S. E. S. mem sendos oficialan delegiton.

Anstataŭ aperigi svisan gazeton oni decidis eldoni propagandilojn kiel la grupoj de Bern kaj St. Gallen jam faris.

La kunveno rekomendis: 1. interŝanĝi vizitojn inter najbaraj grupoj; 2. sendi ĉiumonate aŭ dumonate raporton pri la okazintaĵoj al la Centra Komitato.

S.E.S. sendos oficialan leteron al la L.K.K. de la 15a Internacia Kongreso en Nürnberg, petante malaltigon de la kongreskotizaĵo por Svislando, kiu ne estas proporcia je la salajroj pagataj en Svislando nek proporcia al la kotizaĵoj de la aliaj landoj.

Post la kunveno ĉirkaŭ 40 esperantistoj kunvenis en korporacia domo „Waag". La Zurich'a esp. ĥoro kantis, kelkaj samideanoj deklamis. Prof. Müller, prezidanto de tiu familia kunveno, S-roj Privat kaj Spielmann faris paroladojn.

La festeto finis per lumbilda parolado de Skoltestro pri aviado kaj flugaparatoj. Oni havis okazon vidi kelkajn kliŝaĵojn por propagando de Esperanto faritajn de S-ro J. Perlet. Loterio ebligis pagi ĉiujn elspezojn de la grupo.

Tiu ĝenerala kunveno montris la utiligon de Esperanto por sinkomprenigo eĉ inter svisoj, anoj de la germana, franca kaj itala lingva parto.

La Centra Komitato kore dankas la grupon de Zürich, kiu sindone kaj sukcese aranĝis la kunvenon. Agema fervoro kaj vigla atmosfero regis dum la tuta kunveno kaj ankaŭ dum la prepara kunsido de Delegitoj sabaton vespere.

Alice Diekmann, sekretariino.

☞ UEA kreskos kaj fortiĝos precipe per la individua agado de ĉiuj siaj membroj. Por 1923 ĉiu membro klopodu por varbi almenaŭ unu novan asocianon! ☜

SOCIA VIVO

Protektado de Infanoj.

De D-rino *Marguerite Beck*,
Direktorino de Socia Lernejo Virina en Genève.

La protektado de infanoj estas temo tre vasta: la studentinoj de la „Lernejo pri Sociaj Studoj“ en Genève studas tiun temon dum la du plenaj jaroj de ilia kurso. Tial mi priparolos en ĉi tiu artikolo nur parton de la protektado de infanoj laŭ leĝo civila, speciale pri la kuratoreco.

La kuratoreco ne ĉiam estis institucio tiel filantropia kiel nuntempe. En antikva juro la kuratoro havis rajtojn kaj povojn. Nun li havas precipe devojn.

Ne nur la karaktero de tiu institucio ŝanĝiĝis, sed ankaŭ la rilatoj de la virinoj je ĝi. En antikvaj tempoj la virino mem estis ĉiam sub kuratoreco (ĉu patra, ĉu edza). Poste ŝi mem ne plu estis sub tiu reĝimo sed ŝiaj infanoj ne apartenis al ŝi laŭleĝe. La povo estis en manoj de viroj. La novaj leĝoj ebligas ŝin nun esti mem kuratorino de ŝiaj infanoj, se ŝi estas vidvino, aŭ eĉ ankaŭ de aliaj infanoj. En Svislando la sola diferenco inter ŝi kaj viro en tiu rilato estas, ke en du okazoj la viro nepre devas akcepti kuratorecon, dum la virino havas la liberecon akcepti aŭ rifuzi. Jen en kelkaj vortoj la resumo de progreso malrapide kreskinta.

Flanke de tiuj ŝanĝoj jus karakterizitaj estas ankoraŭ alia evoluo konstatinda.

En antaŭaj tempoj la tuta juro pri tiu temo estis familia. Laŭ la antikva germana juro la plej proksima parenco havis rajton esti kuratoro. Poste la potenco de l' ŝtato pligrandiĝis kaj la familiaj rilatoj malgraviĝis. Tiam la ŝtato komencis unue kontroli la familiajn kuratorojn, poste elekti ilin, fine ĝi kreis aŭtoritatojn apartajn por tiu celo. Nun la komunumo komisias profesian kuratoron. Tiamaniere la afero pasis de privata al ŝtata kampo. La oficiala kuratoro estas persono dungita de la komunumo por prizorgi plurajn infanojn. En multaj komunumoj tiuj zorgantaj oficoj ne ankoraŭ ekzistas. Mi deziras montri kiel necesa estas tiu institucio.

En Svislando ĉiu infano, kiu ne estas sub gepatra potenco, devas havi kuratoron. La orfoj apartenas al tiu kategorio, sed ankaŭ la infanoj de maldignaj aŭ malkapablaj gepatroj el kiuj la aŭtoritatoj forprenis la gepatran potencon. Ankaŭ plenaĝaj personoj, kiel drinkuloj, frenezuloj, malŝparuloj, bezonas kuratoron. Tiamaniere ilia gepatra aŭtoritateco estas forprenata kaj iliaj infanoj povas ĝui bonan edukadon. Eksterleĝaj infanoj profitas ankaŭ de tiu leĝo. Ilia kuratoro devas defendi iliajn interesojn kaj speciale konduki proceson pri patreca serĉado.

Plie en ĉiuj kazoj kiam la gepatroj ne plenumas siajn devojn, se la infanoj suferas je korpa aŭ morala malsano, la aŭtoritatoj forprenas kaj loĝigas ilin en taŭga familio aŭ institucio, eĉ kontraŭ la volo de la gepatroj. Tiuj ĉi konservas la gepatran potencon — la daŭra proceso de forprenado de la gepatra potenco ne estas necesa — sed la decidoj pri la infano estas prenataj de la aŭtoritatoj aŭ de la persono komisiita al tiu tasko. Tiu zorganto ne havas la samajn devojn kiel la kuratoro, sed ĝi estas ofte pli malfacila, ĉar li bezonas konvinki la gepatrojn pri ĉiu aranĝo kiun li volas fari. Se li ne akiras tiun gepatran konsenton, la infano estas malbone influata kontraŭ la protektanto kaj tiamaniere edukado fariĝas neebla.

Malgraŭ la bona kaj perfekta fundamento por protektado de infanoj la apliko de la leĝo estas ofte malbone efektivigita en urboj, kiuj ne havas profesiajn zorgantojn.

Hodiaŭ la bonvola kuratoreco estas senefika preskaŭ ĉie, precipe en urboj. Dum la mezepoko la simpla vivo en malgrandaj urboj aŭ vilaĝoj permesis al la kuratoro koni persone siajn zorgatojn. Tiuj ĉi generale loĝis ĉe li. Nun la vilaĝoj kaj industriaj centroj estas pli vastaj, la loĝantaro konstante ŝanĝas, la personoj estas multe pli okupataj de sia profesio kaj ne plu havas tempon por tia zorgado. Sekve oni ne devas miri ke la privataj personoj nomitaj de la aŭtoritatoj klopodas malakcepti tiun taskon. En grandaj urboj la aŭtoritatoj ne konas la plej taŭgajn personojn por tiu celo kaj eĉ foje serĉas nomojn iom hazarde en adreslibroj. Imagu kiel taŭgaj estas la elektitaj personoj! Kelkafoje personoj tute netaŭgaj estas elektitaj, ekzemple bopatro aŭ posta edzo de juna patrino. Eĉ se la zorgantoj estas pli bone elektitaj, estas fakto ke nepagitaj personoj ĝenerale ne plenumas sian taskon tiel kontentige kiel profesiuloj, kiuj povas dediĉi sian tutan tempon al la afero. Pri la financa fako de la zorgado la privatuloj laboras ĝenerale sufiĉe bone, sed pri la edukado mem la profesiuloj estas multe pli preferindaj ĉar ili estas speciale preparitaj laŭ pedagogia vidpunkto. Tiu preparado estas tiom pli necesa ke temas ĝenerale pri nenormalaj infanoj psikologie aŭ nerve malsanaj. Jura scio estas ankaŭ ofte necesa, speciale por zorgado de eksterleĝa infano.

Sen kuratora oficejo la disponoj de la leĝo malbone aŭ tute ne efektiviĝas. En multaj kazoj la protektado de infanoj ekzistas nur sur papero. Oni lasas en plena libereco personojn, kiuj devus esti gardataj kaj oni lasas al neindaj gepatroj multajn infanojn, kiuj bezonas zorgojn.

Espereble oni vidos baldaŭ la necesecon de profesiaj kuratoroj kaj ĉiu granda komunumo organizos tiun servon.

Internacia Labora Oficejo.

Laboro kaj malaltaj valutoj.

Internacia Labora Konferenco postulas enketon.

„Ĉu malaltigita valuto kunportas malaltan vivnivelon?“ Tio estas demando farita ĉe la kvara kunsido de la Internacia Labora Konferenco de la Ligo de Nacioj, okazinta en Genève. Per 59 voĉoj kontraŭ neniu, la konferenco, konsistanta el reprezentantoj de registaroj, mastroj kaj laboristoj, decidis komisii al la Internacia Labora Oficejo fari enketon en Germanujo kaj aliaj landoj havantaj grave malaltigitan valuton por klarigi tiun ĉi demandon.

La rezolucio, proponita de la ĉeestantaj laboristaj delegitoj kaj akceptita de la konferenco, estas jena:

„La konferenco, konsiderante la tre fortan maltrankvilecon inter laboristoj, kaŭzitan de la lasttempa malaltiĝo de la vivnivelo en iuj landoj;“

„Konsiderante ke tiu ĉi malaltiĝo de la vivnivelo iras konforme al la daŭra malaltiĝo de la valuto en iuj landoj, ekzemple en Germanujo“;

Konsiderante, ke en tiuj landoj ekzistas danĝero, ke la malboniĝo de la vivkondiĉoj kondukos la loĝantaron, kaj sekve la laboristojn al teruraj malfacilaĵoj, kaj eĉ metos en danĝeron estontan generacion;

„Konsiderante la grandan nombron de laboristoj influitaj de tiu situacio, kiu eble etendiĝus en aliajn landojn“;

„Rememorante la XIIIan parton de Kontrakto de Versailles kaj speciale la vortojn „la garantio de salajro certigante taŭgan vivkondiĉon“;

Komisias al la Internacia Labora Oficejo fari dokumentan enketon pri la vivnivelo de la laborista klaso kompare kun la antaŭmilita nivelo en Germanujo kaj la ceteraj landoj havantaj grave malaltigitan valuton, por klarigi la situacion, kaj por konstati la rimedojn jam enkondukitajn aŭ projektitajn en tiuj landoj por garantii al la laboristoj salajron certigantan taŭgan vivkondiĉon“.

S-ro Thorberg, sveda laborista delegito, insistis je la graveco de tia esplorado laŭ la vidpunkto de la laboristoj en sia lando. Ne estas eble konkuri kontraŭ germanaj komercaĵoj, kiuj estas malkaraj, ne sole dank' al la pli malalta valuto, sed ankaŭ dank' al la pli malalta vivnivelo en Germanujo.

(La Internacia Laboroficejo en Genève *(Bureau International du Travail)* eldonis 4 foliojn en Esperanto kaj plezure sendas ilin al la petintoj.)

SCIENCO

Pensoj.

Lingvo, lango kaj orelo.

Unu el la plej saĝaj donacoj de la naturo estas la lingvo. Ofte la homoj ne faras ĝustan uzon de ĉi tiu benplena kapablo, ĉar multaj proverboj, kiuj esprimas la popolan sperton akcentas la valoron de la silento. La parolado estas arĝenta, ora la silento! Ni do vidas, ke ankaŭ la silentado estas arto. Tamen la ĝusta kaj celplena profitigo de la lingvo, per kiu ni povas esprimi la pensojn de nia interna vivo, devas esti rigardata kiel fonto de lumo kaj de beno al la homaro. Sen la lingvo la homara kulturo ne estus ebla. Ni imagu unu momenton ke la homaro ne povus paroli; kiujn sekvojn havus ĉi tiu fakto? Ĉu ne ŝajnus, ke la homa vivo venus al haltiganta baro kaj konfuzo? Sen la komprenilo de la lingvo ĉiu vivus por si mem; la interesoj de ĉiu limiĝus al la unuopa individuo; la penso pri socialaj taskoj ne ekzistus; ĉar la kondiĉo kaj bazo de la vivo sociala tute mankus ... la lingvo.

Per ĝi ni povas esprimi, kio movas nian internon, la lingvo estas la portanto de la pensoj; la vivo de l' animo leviĝas per la vortoj al grandeco kaj alteco de la sento. Kiel riĉaj ni estas per la lingvo!

Plie, konsideru la aparaton kaj la materialon, kiun la naturo uzis por krei la lingvon! Se ni komparas la parolaparaton kun orgeno, la pulmo liveras la venton por ebligi ĝian funkciadon. La voĉrubandoj rezistas al la elflueganta aero kaj ekvibras; la voĉfendoj permesas la eliron de la aero. La diversspecaj tonoj estas farataj per la meto de buŝo kaj lango. Mirinda estas la granda varieco de la tonoj kompare kun la relative simpla aparato.

Oni atentu, ke la aero uzata por efiki la tonojn jam estas utiligita de la pulmoj por alporti al la korpo la oksigenon, kiun ĝi bezonas por vivi. Kiel inĝeniero tiras utilon el la gasoj jam bruligitaj, kiuj do jam plenumis sian celon, tiel la senvalora materialo elpuŝita de l'pulmoj solvas la taskon estigi la parol- kaj kant'tonaron!

Sed por kio utilus la tonoj en ilia multnombra varieco kaj nuanceco, se ne ekzistus ankaŭ la ricevaparato por ili? Nenion valoras la tonoj, la melodia sonaro, sen la respondanta organo, la orelo. Tiu estas la komplemento al la parolorgano, mirinda de la teknika vidpunkto, prudente aranĝita rilate al ĝia celo kaj efiko, ĉar la kompreno inter la homoj ebligas la interŝanĝon de la pensoj kaj per tio la kulturon kaj progreson, majesta, ĉar ĝi malfermas la pordon al ĉielaj harmonioj. Saĝe unu organo estas kreita por la alia, ambaŭ formas tutecon kaj montras la plenan laboron de la naturo, kiu tiel kronis sian arton.

La orelo, kiu per aeraj ondoj peras la eksteran mondon, estas kapabla percepti ĉiujn sonojn, kies vibronombro estas inter ĉirkaŭe 30 kaj 30.000 po sekundo. La nuancoj de la tonoj estiĝas per kunvibrantaj subtonoj. Se mankus al nia orelo la funkcio percepti la multnombrajn nuancojn, ni verŝajne aŭdus nur unutonajn sonojn, kaj la muzika percepto de la aeraj vibroj estus malebligita al ni. Certe, se la originala destino de la orelo estus konservi la vivon kontraŭ malamikoj, sufiĉa estus organo, kiu anoncas la bruojn kiel signon de l' danĝero per unusona percepto. Sed la komplikita konstruo supozigas nin, ke la naturo volis pli ol doni avertilon en la batalo de l' vivo; ĝiaj intencoj transiras ĉi tiun limon; la eco de la orelo estas tia, ke en ĝi kuŝas granda riĉeco de l' ĝojo kaj ŝprucanta fonto de l' feliĉo, kiu enkondukas la homaron ekster la materiala vivo en la superan regnon de la harmonio.

Sed plie, la aparato bezonas ne sole bonan materialon, pripensitan konstruon ..., kie estas, kiu regas ĝin? La sonoj do estas nenio alia ol korpa vibrado, transportita al la orelo, kies mekanika instalo permesas la ricevon de la aeraj ondoj, sed la orelo scias nenion de la sonoj penetrantaj tra ĝi; estas la aŭdonervoj, kiuj kondukas la sentadon de la sonoj en la aŭdocentron de la cerbo. Ĉi tie la sonoj ŝanĝiĝas en tonoj, en harmonioj kaj melodioj. Ni ne estas kapablaj pluen sekvi la vojon de la naturo ĝis tien, kie estas la loĝejo de la konscio, kiu estas la fonto de niaj ĝojoj kaj doloroj. La konscio de ni mem estas la plej granda enigmo, kies solvo ŝajnas eterne ne ebla. Ankaŭ la materialo de la ĉeloj de la cerbo estas simpla kaj kalkulebla pri pezo kaj kvanto, sed ĝia ago ne estas komprenebla al ni. Ni miras, ke nenia tasko ŝajnas tro malfacila al la naturo: el korpa ŝtofo ĝi kreis estaĵojn kun spirita vivo Kiel granda la arto, kiel pli granda la artisto!

Friedrich Jahn.

Helpu ŝpari

sendante duoblan poŝtkarton kiam vi petas informon de la C. O. de UEA.

La kosto de afranko estas la plej alta en Svislando.

Al niaj kunlaborantoj!

Oni sendu la manuskriptojn, kronikaĵojn, anoncojn ĝis la 15a de ĉiu monato por apero en la sekvanta monato.

LITERATURO

La violono de Rotschild.

De *Anton Ĉehov*.

La urbeto estis malgranda, pli malbona ol vilaĝo. Vivadis en ĝi nur gemaljunuloj, kiuj mortis tiel malofte, ke estis eĉ ĉagrenige. La malsanulejo kaj la mallibereja kastelo bezonis tre malmulte da ĉerkoj. Unuvorte la negoco estis malbonega. Se Jakov Ivanov estus estinta ĉerkisto en gubernia ĉefurbo, li estus posedinta propran domon kaj oni estus nominta lin Jakov Matveiĉ[1]; sed tie ĉi, en la urbetaĉo, oni simple nomis lin Jakov, kaj en la strato li estis konata sub la moknomo Bronzo. Li vivadis malriĉe, kiel simpla kamparano, en malgranda, malnova dometo, en kiu estis unu sola ĉambro. En tiu ĉi ĉambro lokiĝis li mem, Marfa, forno, duloka lito, ĉerkoj, stablo kaj tuta la mastrajaro.

La ĉerkoj, farataj de Jakov, estis bonaj, fortikaj. Por kamparanoj kaj malaltklasaj urbanoj li ilin faris laŭ sia propra amplekso. Tiamaniere li neniam eraris; ĉar, kvankam li jam estis sepdekjara, ne ekzistis homoj pli longkreskaj kaj pli fortikaj ol li, eĉ en la mallibereja kastelo. Por nobeluloj kaj virinoj li faris ĉerkojn laŭ mezuro, uzante por tio feran arŝinmezurilon[2]). Mendojn de ĉerkoj por infanoj li akceptis malplezure, kaj ricevante la monon por sia laboro, li kutimis diri:

— Verdirante, mi ne ŝatas okupiĝi pri stultaĵoj.

Krom lia metio, alportis ankoraŭ al li malgrandan profiton violonludado. Ĉe edziĝfestoj, en la urbetaĉo, kutime ludis hebrea orkestro, direktata de l'stanisto Moisej Iliĉ Ŝaĥkers, kiu prenis por si pli ol duonon de l'profito. Ĉar Jakov tre lerte ludis violonon, precipe rusajn kantojn, Ŝaĥkers kelkafoje invitis lin en la orkestron kun pago de kvindek kopekoj potage, ne kalkulante la donacojn de l'gastoj. Kiam Bronzo estis sidanta en la orkestro, antaŭ ĉio lia vizaĝo ŝvitis kaj purpuriĝis. Estis varmege, odoris je ajlo ĝis sufokiĝo; la violono akre kaj plende krietis; apud lia dekstra orelo stertoris la kontrabaso; apud la maldekstra — ploris la fluto. Tiun ĉi ludis flavruĝa, maldika hebreo kun tuta reto de ruĝaj kaj bluaj vejnetoj sur la vizaĝo, samnomulo de l'fama riĉulo Rotschild. Kaj la malbenita judo lerte penadis plendludi muzikaĵojn plej gajajn. Sen iu evidenta kaŭzo Jakov iom post iom enpenetriĝis per malamo kaj malestimo al la hebreoj, sed speciale al Rotschild. Li komencis ĉikani, insulti lin per malbonaj paroloj. Unufoje li eĉ ekvolis lin bati. Rotschild tiam ofendiĝis kaj, kolerege lin rigardante, li ekdiris:

— Se mi ne estimus vin pro via talento, jam de longe mi estus flugiginta vin tra la fenestro.

Poste li ekploris. Tial oni ne ofte invitis Bronzon en la orkestron, nur en okazo de ekstrema neceso, kiam mankis iu el la hebreoj.

Jakov neniam estis bonhumora, ĉar li devis konstante suferi terurajn malprofitojn. Ekzemple, estas peko labori dimanĉojn kaj festtagojn, kaj lundo estas tago peniga. Tiamaniere dum la jaro kunkolektiĝas ducent tagoj, kiam oni devas nevole resti kun brakoj interplektitaj. Pensu do, kia malprofito! Estis ankaŭ malprofito, se iu en la urbo edziĝfestis sen muziko aŭ Ŝaĥkers ne invitis Jakov'on. La policinspektoro du jarojn malsanis kaj konsumiĝis. Jakov atendis lian morton kun malpacienco. Sed la inspektoro ekveturis en la gubernian ĉefurbon por kuraciĝi kaj li mortis tie. Jen ankoraŭ malprofito, minimume de deko da rubloj, ĉar oni verŝajne estus mendinta por li ĉerkon luksan. Tiuj pensoj pri malprofitoj precipe turmentadis Jakov'on nokte. Pro tio li metis sian violonon flanke de si, en la liton. Kiam sensencaĵoj komencis alrampadi en la kapon, li tuŝis la kordojn, la violono eligis sonon, kaj iom pliboniĝis al li.

Antaŭ unu jaro, la sesan de majo, Marfa ekmalsaniĝis.

La maljunulino estis pene spireganta, trinkanta multe da akvo kaj ŝanceliĝanta. Tamen, matene ŝi mem hejtis la fornon kaj eĉ alportis akvon el la rivero. Ĉirkaŭ vespero ŝi enlitiĝis. La tutan tagon Jakov estis ludanta la violonon. Kiam estis tute tenebriĝinte, li ekprenis la libreton, en kiun li enskribadis ĉiutage siajn malprofitojn. Pro malgajeco, li komencis ilin sumigi por la jardaŭro. Sumiĝis pli ol mil rubloj. La rezultato tiel impresegis lin, ke li ekĵetis la bulkalkulilon sur la plankon kaj piedekfrapadis. Poste li levis la kalkulilon kaj longatempe denove klakadis per la buletoj, profunde kaj pene ĝemetadante. Lia vizaĝo purpuriĝis kaj malsekiĝis pro ŝvito. Li pensis, ke, se li estus enmetinta la perditan milon en la bankon, dum la jaro estus alkreskintaj minimume kvardek rubloj de procentoj. Tiuj kvardek rubloj estis do ankaŭ malprofito. Unuvorte, kien ajn turniĝu, ĉie estas nuraj malprofitoj kaj nenio alia.

— Jakov! — neatendite ekvokis Marfa. — Mi estas mortanta.

Li ekrigardis la edzinon. Ŝia vizaĝo, rozkolora pro febro, estis eksterordinare klara kaj ĝoja. Bronzo, kutimiĝinta ĉiam vidi ŝian vizaĝon palan, timan kaj malfeliĉan, nun konfuziĝis. Ŝajnis, ke ŝi efektive estas mortanta kaj pro tio kontenta; ke ŝi fine foriras por ĉiam de tiu ĉi dometaĉo, for de l' ĉerkoj, for de Jakov... Ŝi estis rigardanta la plafonon, movetante la lipojn. Ŝia vizaĝesprimo estis feliĉa, kvazaŭ ŝi vere vidus la morton, sian liberiganton, kaj interparolus kun ĝi.

Jam tagiĝis. Tra la fenestro vidiĝis fajra matenruĝo. Rigardante la maljunulinon, Jakov ial ekmemoris, ke dum sia tuta vivo li, ŝajnas, eĉ ne solan fojon estis karesinta aŭ kompatinta ŝin; ne unu solan fojon li estis ekpensinta aĉeti por ŝi tuketon aŭ alporti al ŝi de edziĝfesto ian dolĉaĵon. Li ĉiam nur grumblegis kontraŭ ŝi kaj admonis ŝin pro malprofitoj. Kiam da fojoj li sin ĵetis kontraŭ ŝi kun pugnoj levitaj. Vere, li neniam ŝin frapis. Tamen, timigita, ŝi ĉiufoje rigidiĝis pro teruro. Neniam li diris, ke ŝi trinku teon; eĉ sen tio la elspezoj estis jam grandaj; kaj ŝi trinkis nur varmegan akvon. Nun li komprenis, kial ŝia vizaĝo estas tiel stranga kaj ĝoja. Sento de ĝeno kaj aflikto ekkaptis lin.

Atendinte le matenon, li prunteprenis ĉevalon ĉe najbaro kaj veturigis Marfa'n en la hospitalon. Tie la malsanuloj estis malmultenombraj kaj la geedzoj ne devis atendi longatempe, nur tri horojn ĉirkaŭe. Je la granda plezuro de Jakov tiun ĉi fojon la malsanulojn akceptis ne la doktoro, kiu ĵus estis mem malsana, sed la kurachelpisto Maksim Nikolaiĉ[3]). Li estis maljunulo, pri kiu oni diradis en la urbo, ke, kvankam ebriema kaj batema, li estis pli lerta ol la doktoro.

— Ni deziras al vi sanon. — diris Jakov, enkondukante la maljunulinon en la akceptejon. — Pardonu, ke ni ĉiam malkvietigas vin par niaj malgravaĵoj. Jen bonvolu rigardi, ekmalsaniĝis mia objekto, amikino de l' vivo tiel dirante, pardonu la esprimon...

Kuntirinte siajn grizajn brovojn karesetante la vangharojn, la kurachelpisto komencis ekzameni la maljunulinon. Ŝi sidis sur tabureto, dorskurba kaj malgrasa, kun akra nazo kaj malfermita buŝo, simila laŭprofile al birdo soifanta.

---

[1] Jakov, filo de Matvej. Tiamaniere oni nomas en Rusio konatulojn pli malpli estimatajn.

[2] Arŝin — rusa mezurilo de longeco, egalas ĉirkaŭe 71 centimetrojn.

[3] Maksim, filo de Nikolaj (Nikolao).

— Je — es . . . Tiel . . . — malrapide elparolis la kurachelpisto kaj eksopiris. — Influenzo, eble ankaŭ febro . . . Tifo nun iras tra la urbo. Kio do? Travivis la maljunulino, glor' al Dio . . . kiom da jaroj?

— Sepdek jaroj sen unu, Maksim Nikolaiĉ.

— Kio do? Travivis la maljunulino. Sufiĉas.

— Tion vi certe juste bonvolis rimarki, — diris Jakov, ridetante pro ĝentileco, — kaj ni estas al vi senteble dankemaj pri via agrableco; sed permesu esprimi al vi, ĉiu insekto volas vivi.

— . . . Volas vivi! — diris Maksim Nikolaiĉ per tia tono kvazaŭ de li dependus, ĉu la maljunulino vivu ĉu ne. Nu! jen kion mi al vi diros, mia aminda. Vi almetu al ŝi malvarmajn kompresojn sur la kapon kaj donu du pulvorojn ĉiutage. Kaj nun, ĝis revido, bonan tagon.

Laŭ lia vizaĝesprimo Jakov ekvidis, ke la stato de Marfa estas malesperiga; ke neniaj pulvoroj plu povas helpi al ŝi. Ekevidentiĝis al li, ke ŝi baldaŭ mortos; se ne hodiaŭ — morgaŭ. Li puŝetis sub la kubuto de l' kurachelpisto, okulsignis al li kaj diris duonvoĉe:

— Maksim Nikolaiĉ, oni eble devus almeti al ŝi kupojn.

— Mi ne havas tempon, aminda mia. Prenu vian maljunulinon kaj foriru. Kun Dio. Ĝis revido.

— Faru al mi tiun favoron, — ekpetegis Jakov. — Vi ja mem bonvolas scii. Se ŝi havus ventrodoloron aŭ iu internajo al ŝi dolorus, nu, tiam — pulvoroj kaj gutoj. Sed nun en ŝi estas malvarmumo! En okazo de malvarmumo urĝas ja ellasi sangon, Maksim Nikolaiĉ.

Dume Maksim Nikolaiĉ jam estis vokinta la sekvantan malsanulon, kaj en la akceptejon eniris virino kun knabo.

— Foriru, foriru . . . — diris li al Jakov, malafabligante la vizaĝon. — Ne ombru tie ĉi.

— En tia okazo, almenaŭ almetu al ŝi hirudojn. Eterne mi preĝos Dion por vi!

La kurachelpisto ekflamiĝis kaj ekkriis:

— Paroladu ankoraŭ! Maldelikatulo . . .

Jakov ankaŭ koleriĝis kaj tute purpuriĝis, sed li nenion plu diris, prenis Marfa'n sub la brako kaj elkondukis ŝin el la akceptejo. Nur kiam ili jam estis sidiĝantaj en la ĉaron, li severe kaj moke rigardis la malsanulejon kaj diris:

— Jen artistoj! Al riĉulo li certe metus kupojn, sed al malriĉulo — eĉ ne unu solan hirudon.

Post kiam ili estis alveturintaj hejmen, Marfa, enirinte en la dometaĉon, starrestis dekon da minutoj, sin tenante je la forno. Ŝajnis al ŝi, ke, se ŝi estos kuŝinta, Jakov parolos pri la malprofitoj kaj riproĉadmonos ŝin, kvazaŭ ŝi ĉiam kaŝus kaj estus mallaborema. Dume Jakov estis rigardanta ŝin kun enuo. Li rememoris, ke morgaŭ estos la festo de Joano Teologo, postmorgaŭ — tiu de Nikolao Miraklisto, kaj poste estos dimanĉo; poste ankoraŭ — lundo, tago peniga. Neeble do estos labori kvar tagojn, kaj Marfa certe mortos en unu el tiuj tagoj. Tial li devas fari la ĉerkon hodiaŭ. Li do ekkaptis la arŝinmezurilon, alproksimiĝis al la maljunulino kaj prenis ŝian mezuron. Poste ŝi enlitiĝis. Jakov krucsignis kaj komencis fari la ĉerkon.

Fininte la laboron, li surmetis okulvitrojn kaj enskribis en sian libreton: „Ĉerko por Marfa Ivanov — 2 rubloj 40 kopekoj.“

Kaj li eksopiris. La maljunulino estis kuŝanta la tutan tempon en silento, kun fermitaj okuloj. Sed vespere, kiam estis noktiĝinte, ŝi ekvokis la maljunulon.

— Ĉu vi memoras, Jakov? — demandis ŝi, ĝoje lin rigardante. — Ĉu vi memoras, kiel antaŭ kvindek jaroj Dio donis al ni infaneton kun blondaj haretoj? Ni tiam kutimis kunsidi apud la rivereto, sub la saliko, kaj kanti kantojn. Maldolĉe ridetinte, ŝi aldonis: — Mortis la knabineto.

Jakov provpenis serĉi en sia memoro, sed li neniel sukcesis rememoriĝi pri la infaneto aŭ la saliko.

— Vi revas, — diris li.

Alvenis la paĉjo[4], komuniigis kaj sanktoleis. Poste Marfa komencis murmuradi ion nekompreneblan. Ĉirkaŭ mateno ŝi mortis.

Maljunaj najbarinoj lavis ŝin, vestigis kaj enmetis en la ĉerkon. Por ne tropagi al la subdiakono, Jakov mem legis la psalmaron. Por la tombo li nenion pagis, ĉar la tombejgardisto estis sambaptopatro. Kvar kamparanoj portis la ĉerkon ĝis la tombejo, ne por mono, sed pro estimo. Malantaŭ la ĉerko paŝis maljunulinoj, almozuloj, du naiveguloj; la personoj renkontataj pie sin krucsignis . . . Kaj Jakov estis kontentega, ke ĉio tio okazas tiel honeste, dece kaj malkare, kaj por neniu ofende. Adiaŭante Marfa'n lastfoje, li tuŝetis la ĉerkon per la mano kaj pensis: „Bona laboro!“

Sed dum la reveno de l'tombejo forta enuego ekkaptis lin. Malsanetiĝis al li: la spirado iĝis varmega kaj malfacila, la kruroj malfortiĝis, logis lin trinki. Kaj jen ĉiaspecaj pensoj ekrampadis en lian kapon. Denove li rememoris, ke dum sia tuta vivo li eĉ ne unu fojon estis kompatinta Marfa'n; ne unu solan fojon li estis montriĝinta al ŝi afabla aŭ karesema. La kvindek-du jaroj kiujn ili estis loĝantaj en la sama dometaĉo, longege daŭris; sed iel okazis, ke dum tiu longa tempo li neniam atentis, neniam pripensis ŝin, kvazaŭ ŝi estus kato aŭ hundo. Tamen ŝi ĉiutage hejtis la fornon, kuiris kaj bakis, alportis akvon, hakis lignon, dormis kun li en unu lito; kaj, kiam, ebria, li revenadis hejmen de edziĝfestoj, ŝi ĉiufoje respekte pendis lian violonon sur la muron kaj enlitigis lin por dormi. Ĉion tion ŝi faradis silente, kun esprimo timeta kaj zorgplena.

Renkonten al Jakov, ridetante kaj salutante, venis Rotschild.

— Mi vin ja serĉas, onĉjo! — diris li. Moisej Iliĉ vin salutas kaj ordonas tuj veni ĉe lin.

En tiu momento Jakov tute ne estis inklina al tio, li estis plorema.

— Lasu min! — diris li kaj daŭrigis sian iradon.

— Sed kiel tio estas ebla? — maltrankviliĝis Rotschild, iom antaŭenkurante. — Moisej Iliĉ ofendiĝos! Li ja ordonis tuj veni!

Ektedis al Jakov la malfacila spirado de l'judo, lia palpebrumado, liaj flavruĝaj lentugoj. Tedis lin la vido de lia verda redingoto kun malhelaj flikaĵetoj, de lia tuta persono facilrompebla kaj delikata.

— Kial vi trudiĝas al mi, ajlo — ekkriis Jakov. — Ne altrudiĝu!

La judo ekkoleriĝis kaj ankaŭ ekkriis:

— Ne tiel laŭte, mi petas. Se ne, mi vin flugigos trans la barilo!

— For de miaj okuloj! — sovaĝe ekkriegis Jakov, ĵetiĝante kontraŭ lin kun levitaj pugnoj. — La vivo netolerebliĝas pro tiuj favuloj!

Pro teruro, Rotschild ekpaliĝis, preskaŭ kaŭriĝis kaj, dismovetante la brakojn super la kapo, li kvazaŭ ŝirmis sin de batoj. Poste li leviĝis kaj forkuris laŭ tuta sia povkapablo. Kurante, li saltetis, kunfrapis la manojn, kaj estis videble, kiel tremas lia longa, malgrasa dorso. La stratknaboj ĝojprofitis la okazon kaj antaŭensaltis kun krioj: „Judo! Judo!“. La hundoj ankaŭ postkuris lin, bojante. Iu ekridegis, ekfajfis, kaj la hundoj ekbojis pli laŭte, pli kune . . . Fine hundo verŝajne mordis Rotschild'on, ĉar subite aŭdiĝis ekkrio malespera, dolora.

Jakov promenis iom sur la paŝtejo, poste li iris laŭ la urbbordo, sencele, kaj la knaboj kriis: „Bronzo iras! Bronzo iras!“ Kaj jen la rivero. Tie skolopetoj flugis, akre pepadante; kriadis anasoj. La suno varmegis kaj la akvo tiel brilegis, ke okuldoloris ĝin rigardi. Jakov malrapide paŝis sur la vojeto laŭlonge de l'bordo kaj vidis, kiel eliris el la riverbanejo grasa ruĝvanga sinjorino; kaj li ekpensis pri ŝi: „Jen kia lutrino!“ Proksime de l'banejo knaboj estis kaptantaj kankrojn. Ekvidinte lin, ili malbonece ekkriis: „Bronzo! Bronzo!“ Kaj jen maljuna, ampleksa saliko kun kaverna trunko, kaj sur la saliko vidiĝas korvonestoj. Subite, en la memoro de Jakov ekkreskas, kiel vivanta, la infaneto kun la blonda hararo kaj la saliko, de Marfa priparolita. Jes, estas la sama saliko — verda, kvieta, malgaja . . . Kiel ĝi maljuniĝis, kompatinda!

---

[4] Ortodoksa rusa patro.

Li sidiĝis sub ĝin kaj komencis rememoriĝi. Sur la alia bordo, kie nun estas herbejo oftfoje subakvigata, en tiu tempo staris ampleksa betularbaro; kaj jen, sur tiu kalva monto, vidiĝanta je la horizonto, tiam bluiĝis maljunega pinarbarego. Sur la rivero tiam navigadis barkoj. Kaj nun ĉio estas ebena kaj glata. Sur la alia bordo staras unu sola betuleto, tute juna kaj gracia, kiel juna fraŭlino. Sur la rivero vidiĝas nur anasoj kaj anseroj. Tute ne aspektas, kvazaŭ barkoj estis iam navigantaj tie ĉi. Ŝajnas, ke, kompare al la pasinto, eĉ la anseroj malplimultiĝis. Jakov fermis la okulojn, kaj en lia imago ekflugis, unu renkonten al la alia aregoj da blankaj anseroj.

Li miregis, kiel okazis, ke dum la lastaj kvardek aŭ kvindek jaroj li neniam venis al la rivero, kaj, se li eble eĉ venis, li neniam atentis ĝin. La rivero estas ja taŭga, ne senvalora. Oni povus estigi sur ĝi fiŝkaptadon. La fiŝojn oni povus vendi al negocistoj, al ŝtatoficistoj, al la bufedisto de l' stacidomo, kaj poste meti la monon en la bankon. Oni povus boatnaĝi de unu bieno al la alia por violonludi, kaj la homoj de ĉiaj rangoj bone por tio pagus. Oni povus provi reestigi barknavigadon — pli bona afero ol ĉerkfarado. Fine oni povus bredi anserojn, buĉi ilin kaj forsendi vintre Moskvon. Nuran lanugon oni eble amasigus jare por deko da rubloj. Sed li ĉion preterlasis kaj nenion el tio li faris. Kiaj malprofitoj! Ha, kiaj malprofitoj! Kaj, se li estus okupiĝinta pri ĉio tio kune — fiŝkaptado, violonludado, navigado kaj anserbuĉado, kia kapitalo estus formiĝinta! Sed ĉio tio eĉ en revo ne ekzistis; la vivo pasis senutile, senplezure; ĝi por nenio perdiĝis, eĉ ne por pinĉpreno da tabako. Nenio restas plu antaŭe. Se li rigardas malantaŭen, nenio vidiĝas krom malprofitoj, malprofitoj tiel teruraj, ke li tremfrostas, pripensante ilin. Kial do homoj ne povas tiel vivi, ke tiuj perdoj kaj malprofitoj ne ekzistu? Ekstaras la demando, kial oni dehakis la betularbaron kaj la pinarbaregon. Kial la paŝtejo ne estas utiligata? Kial la homoj ĝuste faras ne tion, kio necesas? Kial Jakov, dum sia tuta vivo, estis insultanta, krieganta, ĵetiĝanta pugnominacante, ofendanta sian edzinon? Kaj jen ankoraŭ demando: por kia neceso li ĵus timigis kaj ofendis la hebreon? Kial, ĝenerale, la homoj malhelpas vivi unu al la alia? Kiaj malprofitoj rezultas pro tio! Kiaj teruraj malprofitoj! Se ne ekzistus malamo kaj malico, la homoj utilegus ja unu al la alia.

Vesperon kaj nokton sekvintajn, sonĝaperadis al li la infaneto, la saliko, fiŝoj, buĉitaj anseroj, Marfa simila laŭprofile al birdo soifanta, kaj la pala, kompatinda vizaĝo de Rotschild. Iuj buŝaĉoj, alpuŝiĝante el ĉiuj flankoj, estis murmurantaj pri malprofitoj. Li turniĝadis de flanko al flanko kaj eble kvin fojojn li leviĝis por violonludi.

Matene li penege ellitiĝis kaj direktiĝis al la malsanulejo. La sama Maksim Nikolaiĉ ordonis al li almeti malvarman kompreson al la kapo kaj donis pulvorojn. Laŭ lia vizaĝesprimo kaj voĉtono Jakov ekkomprenis, ke lia stato estas malesperiga; ke neniaj pulvoroj lin helpus plu. Reirante hejmen, li konsideris, ke la morto estos nura profito: oni bezonas nek manĝi nek trinki, nek pagi impostojn, nek ofendi homojn. Plie, ĉar homo kuŝas en la tombo ne unu jaron, sed centojn kaj milojn da jaroj, ĉion kunkalkulinte, oni konstatos profiton grandegan. La vivo malprofitas al homo, morto — profitas. Tiu konsidero certe estas justa, sed samtempe — ofenda kaj maldolĉa: kial regas en la mondo tiel stranga ordo, laŭ kiu la vivo, nur unufoje al homo donita, pasas senutile?

Ne estis ĉagrene morti. Tamen, kiam li hejme estis revidinta la violonon, lia koro kunpremiĝis, bedaŭro lin ekkaptis. Oni ne povas kunpreni violonon en la tombon, kaj nun ĝi orfiĝos kaj okazos al ĝi same kiel al la betularbaro kaj al la pinarbarego. Ĉio en tiu ĉi mondo perdiĝadis kaj perdiĝados! Jakov eliris el la dometaĉo kaj sidiĝis apud la sojlo, premante la violonon al sia brusto. Pripensante la vivon perdiĝintan kaj malprofitan, li ekludis, li mem ne sciante kion. Estis io plenda kaj emocia. Larmoj ekfluis sur liaj vangoj. Kaj ju pli forte li pensis, despli malgaje kantis la violono.

Unu-du fojojn ekknaris la levfermilo, kaj en la kortpordeto montriĝis Rotschild. Li kuraĝe trapaŝis duonon de l' korto, sed, ekvidinte Jakov'on, li subite haltis, malplivolumeniĝis, kaj, eble pro timego, li ekfaris mansignojn, kvazaŭ li volus montri per la fingroj, kioma horo nun estas.

— Venu do, ne timu, — afable diris Jakov kaj signologis lin al si. — Venu.

Kun malfida kaj tima rigardo Rotschild iom alproksimiĝis kaj haltis je unu saĵenj[5]) de li.

— Sed vi bonvolu ne bati min, diris li riverencante. Min resendis Moisej Iliĉ. Ne timu, diris li al mi, reiru al Jakov, kaj diru, diris li, ke sen li neniel eblas. Merkredon okazos edziĝfesto . . . Je-es! Sinjoro Ŝapovalov edzinigas sian filinon kun homo estiminda. Kaj la festo estos riĉa, u-u! — aldonis la judo, fermetante unu okulon.

— Mi ne povas . . ., eldiris Jakov, pene spirante. Ekmalsaniĝis mi, fraĉjo.

Li denove ekludis kaj larmoj ekspruĉis el liaj okuloj sur la violonon. Flankturniĝinte al li, Rotschild staris kun brakoj krucigitaj sur la brusto kaj atente aŭskultis. La esprimo de timo kaj perplekso sur lia vizaĝo iom post iom ŝanĝiĝis kaj anstataŭiĝis per esprimo dolora kaj sufera. Li suprenrulis la okulojn, kvazaŭ spertante revon turmentegan, kaj elparolis. „Vaĥĥĥ! . . .“ Kaj larmoj malrapide ekfluis sur liaj vangoj kaj degutis sur la verdan redingoton.

Poste Jakov kuŝis la tutan tagon kaj enuegis. Vespere venis la paĉjo, kiu, ricevante lian konfeson, demandis, ĉu li ne rememoras iun specialan el siaj pekoj. Streĉigante sian malfortiĝantan memoron, Jakov ekrememoris la malfeliĉan vizaĝon de Marfa kaj la malesperan ekkrion de l'hebreo hundmordita; kaj li diris apenaŭ aŭdeble:

— Donu la violonon al Rotschild.

— Bone, respondis la paĉjo.

Kaj nun ĉiuj en la urbo demandas: „Kie Rotschild akiris tiel bonan violonon? Ĉu li aĉetis aŭ ŝtelis ĝin? Ĉu li eble ricevis ĝin kiel pruntegarantion?“ Jam de longe li forlasis la fluton kaj nun ludas nur la violonon. El sub lia arĉo fluas la samaj sonoj plendaj, kiel antaŭe el la fluto. Sed, kiam li penas ripeti tion, kion ludis Jakov, sidante sur la sojlo, eliĝas io tiel malĝojega, ke la aŭskultantoj ploras, kaj li mem fine suprenrulas la okulojn kaj elparolas: „Vaĥĥĥ! . . .“ Tiel ekplaĉis tiu nova kanto en la urbo, ke Rotschild senĉese estas invitata de negocistoj kaj ŝtatoficistoj, kaj oni devigas lin ĝin ludi po dek fojoj sinsekve.

Tradukis el rusa lingvo *Ch. Rosen.*

---

5) Rusa mezuro de longeco, egalas 3 arŝinojn aŭ 2 metrojn 13 centimetrojn proksimume.

Vintra soneto.

De Petro Stojan.

Arbaro jetis foliaron sian
La tero sonĝas en kvieta dorm',
Ĉielo kovris landon letargian
Per la lanuga blanka uniform'.

Maljuna viro revas apud forno
Fajranta pace en komforta dom'.
Ĉar suno kaŝis sin en Kaprikorno
Malofte vidas ĝin la laca hom'.

Sed venos ree la printemp' radia,
La neĝ' malvarma fluidiĝos for,
La teron kovros la verdaĵ' magia,
Denove kantos gaja birda ĥor',

Kaj la animo de la vir' maljuna
Denove ĝuos en la varmo suna.

* * *

La steloj.

De **Stevan Živanovič.**

Supre ĉiela bluspegulo
Ornamita per la steloj
Sur la tero mizerulo
Dolorplena, sen esperoj.

Flamas ore stelo ĉiu
Forte batas lia koro
Kaj elspiris homo tiu
La sopiron de l' doloro.

Steloj helaj ektremetis
Pro doloro de la homo,
Li rigardon supren ĵetis
Animon venis ekkono.

Rigardante mondon belan
Supre en la trankvileco
Ekvidis li stelon helan
La simbolon de l' saveco.

Kvazaŭ verda ĝia flamo
Vokis lin ja supren iri
En la mondon de la amo
Kaj li ĉesis tuj sopiri.

TRA LA LIBRARO.

Unua Legolibreto — (Rakontoj, fabeloj kaj popol-legendoj) — *K. Brüggemann.* — Universala Biblioteko N-ro 1. — 1922. Esperanto-Verlag Friedrich Ader, Dresden A. 27. 64 paĝoj, $10^1/_2 \times 15^1/_2$ cm. Prezo 18.— M.

Dua Legolibreto (El literaturo, arto kaj scienco) U. B. N-ro 2 (samaj aŭtoro, eldonisto, amplekso kaj prezo.)

Kiuj volas ekzerci sin, tiuj ne plendu pri manko de legolibroj, sed eble baldaŭ estos embarasataj pro la elekto. La du libretoj kompilitaj de S-ro Brüggemann estas plaĉaj laŭ eksteraĵo kaj rekomendindaj laŭ enhavo. La 19 prozaĵoj de l' unua estas plejparte tradukoj el germanaj rakontoj por infanoj, de Grimm kaj aliaj. La 16 tekstoj de l' dua traktas diversajn pli seriozajn temojn. La stilo estas tre klara kaj korekta. Eble pro la sufiĉa amplekso de l' pecoj, ambaŭ libretoj pli taŭgas kiel hejma ekzercilo flanka al kursa lernado ol por dumkursa laboro. Ĉar nur tradukoj el germana lingvo enestas, ili ankaŭ donos al alilandulo ideon pri la riĉeco de l' fonto.

Esperanto Examenopgaven. Versameld door *I. C. Isbrücker-Dirksen.* 1922. — 52 paĝoj, 14×21 cm. Prezo ne montrita.

La aŭtoro havis la bonan ideon kolekti taskojn de Esperanto-ekzamenoj. Estas por la unua ekzameno: tekstoj tradukotaj en Holanda lingvo aŭ en Esperanto, frazaroj esperantigotaj, legaĵoj kun demandoj buŝe respondotaj. Por la dua ekzameno: pli malfacilaj tekstoj en ambaŭ lingvoj kaj temoj por redaktoj. La libreto estos utila gvidilo por instruantoj kaj por lernantoj holandaj.

First Steps in Esperanto. A simple Textbook for English-speaking Beginners, by *Montagu C. Butler.* Ricevebla de: The British Esperanto Association, 17 Hart Street W. C. 1, London. 1922. 80 paĝoj, $12^1/_2 \times 18^1/_2$ cm. Prezo ne montrita.

Kiel diras la titolo, la libro permesas doni al eklernantoj, precipe junaĝaj, la elementojn de nia lingvo per saĝe gradigita instruado. Tiu iompostioma prezentado de l' lingvo, kiel ankaŭ la ĉiama alfaro al angloparolanta lernanto, estis speciale atentataj. Por ankoraŭ plifaciligi la lernon, oni uzas kiel eble plej ofte vortojn kun ia simileco kun la angla kaj rekomendas serĉadon de vortoj kun samaj radikoj en ambaŭ lingvoj. Plie oni utiligos la kunligon de l' ideoj kaj eĉ mnemonikon. La libro enhavas multe da originalaj rimarkoj, la ekzercoj estas allogaj kaj konsistas ĉefe el proverboj, aforismoj, amuzaj anekdotoj, ĉarmaj poezietoj. La tuto pruvas pedagogian kapablon kaj zorgan preparadon.

Mi ne volas esti pli prudema ol Anglo! Tamen mi surprize legas, en porinfana libro, humoraĵojn mokantajn la virinojn aŭ ridigantajn pri geedzoj. Nu, eble kio ŝajnas netakta ĉi flanke de l' kanalo, tio estas taktoplena transe.

Gramatiko, Ekzercoj, Historio de l' internacia helpa lingvo **Esperanto.** *Anakreon Stamatiadis.* Konstantinopolo. 1922, 99 paĝoj, 14×20 cm. Prezo: 3 sv. fr.

Portretoj de Zamenhof kaj de S-ro Cart malfermas la belaspektan volumon. Ĝia unua parto, gramatiko, estas aranĝita kun detalaj klarigoj laŭ la 16^a fundamenta gramatiko, kun listo de sufiksoj kaj rilataj vortoj. Dua parto estas ekzercaro kun frazaroj esperantaj kaj greklingvaj tradukotaj, legaĵoj kaj vortlistoj. Tria, enhavas per demandoj kaj respondoj la historion de Esperanto, la organizon kaj nunan staton de l' movado. Tiel la libro entenas la tutan materialon necesan por ellerni la lingvon kaj pretiĝi je diversgradaj ekzamenoj.

ESPERANTISMO

XVa Universala Kongreso de Esperanto

Nürnberg, 2—8 aŭgusto 1923.

1a, 2a kaj 3a cirkuleroj.*)

L. K. K. La Loka Kongresa Komitato elektita de la Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth konsistas el jenaj personoj:

S-ro D-ro Richard Ledermann, prezidanto (ĝenerala organizo)'
S-ro Otto Pilhofer, 1a vicprezidanto (propagando),
S-ro D-ro Heinrich Orthal, 2a vicprezidanto (gazetaro),
S-ro Max Königsberger, sekretario (financoj),
S-ro Lorenz Meyer (plezuraĵoj),
S-ro Emil Muscat (loĝigo),
S-ro Heinrich Nass (akceptejo),
S-ro Alfred Meyer-Kirstin (oficejo).

Adreso. La oficiala leter- kaj telegramadreso de la L.K.K. estas: *Esperanto, Nürnberg.* Ĉiuj korespondaĵoj koncernantaj kongresajn aferojn, ankaŭ monsendoj, estu adresataj nur al tiu adreso.

Kotizo. La fiksado de la kongresa kotizo estis tre malfacila en la nunaj cirkonstancoj. Ni konsideris, ke la sumo pagota de altvalutaj landoj povas esti pli alta ol tiu pagota de malbonvalutaj, tamen ne tiel, ke la lastenomitaj kaŭzu efektivan malprofiton al la kongresa kaso. Serĉante konvenan bazon, ni starigis interkonsente kun K. K. K. jenan tabelon:

Belgoj 30 frankoj, Britoj 20 ŝilingoj, Danoj 20 kronoj, Ĉeĥoslovakoj 50 kronoj, Finnlandanoj 75 markoj, Francoj 30 frankoj, Germanoj 200 markoj, Hispanoj 25 pesetoj, Italoj 50 liroj, Nederlandanoj 10 guldenoj, Norvegoj 20 kronoj, Svedoj 15 kronoj, Svisoj 20 frankoj, Usonanoj 4 dolaroj, Aŭstroj, Hungaroj, Poloj kaj Rusoj po 200 germanaj markoj. (Vidu ŝanĝojn ĉi sube.)

Ĉiu pagu en la mono de sia lando per monbiletoj aŭ bankoĉeko. Samideanoj el landoj kun aliaj monunuoj ol la supre nomitaj pagu aŭ dolarojn aŭ ŝilingojn aŭ guldenojn aŭ svisajn frankojn aŭ petu pri speciala aranĝo.

Favorkotizoj por familianoj ne ekzistas. Kiu aliĝos post la 1a de junio pagos plialtigon de 50%. Repago de kotizo ne okazos. La unuaj mil aliĝintoj ricevos priurban donacon.

Garantia kapitalo. Por certigi la financojn estas fondita speciala garantia kapitalo, al kiu la samideanoj bonvolu noti garantiojn po almenaŭ 5000 gmk. La garantiitaj sumoj estos enkasigitaj nur, se la kongresaj elspezoj superos la enspezojn, kaj proporcie al eventuala malprofito. Ĝis nun oni garantiis 134.775 mk., 7,50 guld., 15 danaj kr.

Donacoj. Sub tiu ĉi rubriko ni notos donacojn faritajn al la kongresa kaso. Ĉar la organizaj elspezoj estas tre grandaj kaj nur parte povos esti repagataj per la kongresa kotizo, la L. K. K. sin turnas al ĉiuj samideanoj petante monsubtenojn. Ĝi jam ricevis ĝis nun: 34.900 mk., 4 guld., 25 dan. kr., 5 ŝil., 80.250 aŭstr. kr., 162 ĉ. kr., 501,50 pol. mk. kaj 50 fr. fr.

Blindula kaso. Plenumante deziresprimojn de la XIIIa kaj XIVa Kongresoj la L. K. K. akceptas pere de la aliĝiloj mondonacojn por la kaso de blindaj esperantistoj. Ĝi ricevis jam jenajn sumojn: 10.875 mk., 38 ĉ. kr., 5 ŝil., 10 fr. fr., 2 dan. kr., 8250 aŭstr. kr., 3,50 guld.

Envojaĝa permeso. Por envojaĝa permeso, laŭ bavara leĝo, ne la registaro, sed la distrikta polico estas kompetenta. La Esperantema Nürnberga konsilantaro, kiel invitinto de la kongreso, promesis ĉian apogon kaj forigon de ĉiuj rilataj malfacilaĵoj.

Komitato. D-ro Richard Ledermann, prezidanto de L. K. K. kaj Otto Pilhofer, vicprezidanto, estas elektitaj anoj de K. K. K.

Korespondado. Ni petas, ke oni aldonu por kongresaj respondoj la afrankon per laŭlandaj poŝtmarkoj aŭ respondkuponoj.

Kongreskotizoj. Konsiderante la daŭran malplivaloriĝon de la germana marko, ni estas bedaŭre devigitaj plialtigi la nunan kotizon por germanoj, aŭstroj, poloj kaj rusoj, depost la 1a de januaro, de 200 gmk. al 1000 gmk. Pluajn plialtigojn, laŭ la cirkonstancoj, ni devas rezervi al ni. Laŭ petoj pri specialaranĝo la kotizoj estas fiksitaj por bulgaroj je 60 levoj, por rumanoj je 60 leoj, por estlandanoj je 150 e. mk., por Jugoslavoj je 50 dinaroj, por latvoj je 150 latvaj rubloj, por litovoj je 10 litoj.

Aliĝiloj. La aliĝiloj, ĉ. 8000 ekzempleroj, estis dissenditaj meze de novembro, pere de la esperanta gazetaro kaj de la delegitoj de U. E. A. Kiu ne ricevos tiamaniere aliĝilon, bonvolu peti ĝin rekte de la L. K. K.

Aliĝoj. Aliĝis ĝis la 15a de decembro pli ol 1500 personoj el 22 landoj; Armenujo, Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Estlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Nederlando, Polujo, Rusujo, ktp.

La publikigo de la listo okazos en nia oficiala kongresorgano „Esperanto Triumfonta“, kiu represos iom post iom la nomojn de la partoprenontoj.

Kongreskarto. Nia oficiala kongreskarto, desegnita kaj dediĉita de nia komitatano S-ro Heinrich Nass, estas sendpreta. Por kiel eble plej multe ŝpari, ĝi estos dissendata rekte nur al eksterlandanoj, kiuj bezonas ĝin supozeble por la pasporta vizo. Germanoj ricevos ĝin kune per la delegitoj de U. E. A.

Lumbilda propagando. Farinte bonajn spertojn koncerne lumbildan reklamon, ni disponigos al ĉiu granda urbo senpage efikan vitran kliŝon, kiu montras la silueton de Nürnberg, la verdan stelon kaj la ĉie kompreneblan tekston:

XVa Universala Kongreso de Esperanto
2a — 8a de aŭgusto 1923
Nürnberg.

La mendontoj devas garantii, ke ili montrigos la kliŝon je siaj propraj kostoj minimume 3 monatojn en granda teatro aŭ kino. Oni konigu al ni la dimensiojn de la bezonata kliŝo.

Gazetaro. Estas dezirinde, ke jam nun la esperantaj kaj naciaj gazetaroj ĉiulandaj atentigu pri nia XVa. Por tiu ĉi celo ni rekomendas la uzadon de la Nürnberga speciala numero de „Esperanto Triumfonta“, kiu ja enhavas multe da interesa materialo. Ĉiujn koncernajn gazetojn aŭ eltranĉaĵojn oni bonvolu sendi al la L. K. K.

Fakkunsidoj. Fakkunsidojn anoncis:

Por fervojistoj: S-ro sekretario O. Schlicht, adreso: Esperanto Nürnberg.
Por virinoj: S-ino Signe Wollter Pfister, Nürnberg, Baderstr. 17.
Por oficistoj: S-ro Adolfo Oberrotmann, delegito de UEA, Warszawa.

---

*) Ni ne ricevis malgraŭ promeso la du unuajn cirkulerojn de la L. K. K. Sekve ni kopiis el aliaj gazetoj nur la ĉefajn informojn de tiuj du cirkuleroj. (Red.)

Por blinduloj: S-ro Wilhelm Reiner, dir. de la blindula instituto, Nürnberg, Koburger Strasse 147.

Por filatelistoj: Max Hönigsberger, Nürnberg, Albrecht-Dürer-Platz 6.

Por juristoj: D-ro Heinrich Orthal, Nürnberg, Fürther Strasse 2.

Por komercistoj: Emil Muscat, Nürnberg, Tucher Str. 21.

Por kuracistoj: D-ino Eugénie Steckelmacher, Nürnberg, Spittlertorgraben.

Por laboristoj: Georg Gerber, Nürnberg, Allersberger Strasse 57, III.

Por scienculoj: D-ro Otto Kleider, Nürnberg, Kaiserstr. 7.

Kongresaranĝoj. Apud aliaj grandstilaj aranĝoj estas projektitaj internaciaj recitadmatineo, popoldanca revuo kaj piedpilkturniro. Nepra antaŭkondiĉo estas sufiĉa partoprenado. Pro certigo de la aranĝoj ni petas kiel eble plej baldaŭajn sciigojn.

Korespondado. Alvenis al ni lasttempe multaj ne aŭ nesufiĉe afrankitaj privatleteroj, kiuj kaŭzas multe da elspezoj al la kongresa kaso. Ni petas insiste atenti pro tio; alie ni ne povos akcepti nek respondi.

Loka Kongresa Komitato.

Oficiala leter- kaj telegramadreso: „Esperanto Nürnberg“.

Liberaj vortoj.

Prikongresa demando.

Ni vizitas niajn mondkongresojn ne nur por ĉeesti la laborajn kunsidojn kaj la festaranĝojn, sed precipe por praktiki la uzon de nia lingvo, interrilati kun multaj samcelanoj kaj tiel kvazaŭ bani la animon en la dolĉaj ondoj de vera esperantismo. Jen la espero, la deziro, la iluzio de ĉiuj kongresontoj. Kaj la realeco? Ofte mi aŭdis plendojn de kongresintoj, ke ili tute ne havis okazon ekinterrilatiĝi kun eksterlandaj esperantistoj, ke ili solecaj kaj enuigitaj partoprenis la kunvenojn kaj nur povis interparoli kun la amikoj el sia propra lando, kiujn ili jam konis antaŭe. Malgaŭe, seniluziigite ili hejmenveturis, nekontentaj pri si mem, pri la kongreso, pri Esperanto.

Estus fatala eraro, se ni juĝus kulpaj por la menciitaj faktoj nur la nelertecon de la koncernaj personoj. Kiu volas kontraŭbatali malbonaĵojn, devas antaŭ ĉio senpartie esplori kaj konstati la kialojn. — Ju pli grandaj fariĝis niaj kongresoj, des pli multe ili perdis la intiman, familian karakteron de la unuaj kunvenoj. Ariĝas nun kelkaj miloj da vizitantoj, el kiuj nur tre malmultaj konas unu la alian. Certe la gvidantoj de nia movado, partoprenintaj plejgrandparte jam kelkajn kongresojn, retrovas tuj amikojn diverslandajn, ili flirtas de tablo al tablo, ĉie bonvenataj, ĉie hejme. Tial eble ili ne scias pri la sentoj kaj ĉagrenoj de la *„nekonata soldato“*, kiu ŝparis tutan jaron por la kongresa vojaĝo, kiu alvenas la bruston ŝvelitan de atendoj kaj homamemo, kiu eniras la salonegon je la interkonatiĝa vespero kaj — — — estas alblovata de malvarma vento de fremdeco. Kiu atentas lin? Neniu. Kiu alparolas lin? Neniu. Eble vi diros, ke li ja mem povas alparoli iun ajn, ĉeestas ja nur esperantistoj! Teorio, nura teorio! Efektive tute ne estas kutimo, ankaŭ ne ĉe niaj kongresoj, ke iu ajn alparolu ĉiujn ajn. Tion riskas senĝenaj, lertaj uloj, kiuj ofte frekventas societojn kaj per tio akiris rutinon. Sed multaj el niaj samideanoj estas iom timemaj aŭ nelertaj. Ili hontas, preni lokon ĉe tablo okupita de aro da alinacianoj, timantaj, ke ili ĝenas. Precipe sinjorinoj neakompanataj irintaj al kongreso, pro komprenebla rezervemo ne eniras iun ajn societon. Kio rezultas? Per propraj okuloj mi vidis en Praha tablon, kie nur sidis Dresdenanoj, alian kun svedoj, alian kun hungaroj ktp. Kiu malkonfesas ĉi tiun ridindan kaj nedezirindan fakton, aŭ ne povas, aŭ ne volas vidi malagrablan veraĵon?

Ni devas serĉi kuracilon kontraŭ la priskribita „kongresa malsano“. Taŭgaj ŝajnas al mi la sekvonta ideo: la loka kongresa komitato starigu „komisionon por soluloj.“ Ĉe tiu ĉi komisiono anoncu sin ĉiu kongresonto, kiu deziras ĝian servon, skribante siajn dezirojn specialajn. La komisiono prilaboras la petojn kaj *peras* la korespondadon inter la personoj, kies deziroj renkontiĝas. Per tio samideano X el Bamberg tuj alvenanta en la kongresurbo scias, ke je la interkonatiĝa vespero li trovos S-ron Y el Londono, unu el ili prezentos al la alia siajn amikojn kaj tiamaniere la priskribita malsano elradike estos forigata. Skeptikulo, al kiu mi entuziasme deklamis mian projekton, moke respondis, ke mia komisiono fariĝos efektive poredziĝa peradejo. Tion mi ne intencas; tamen certe ne estus malfeliĉo. se per ĉi tiu vojo edziĝemulo trovus sian Esperantistinon. Cetere mi ne arogas al mi solvi, ĉefe mi intencis montri la problemon. Pripensu ĝin kaj proponu!

D-ro *Orthal*, Nürnberg.

KRONIKO.

Ni raportas nur pri gravaj aŭ ĝeneralinteresaj faktoj.

Belgio.

La urba konsilantaro de Verviers voĉdonis 500 fr. da monhelpo por organizo de Kurso de Esperanto en lernejoj.

Ĉeĥoslovakio.

La „Rondeto de esperantistinoj“ en Praha sendis 500 Kĉ kaj pakaĵon kun nutraĵoj al malsatantaj rusaj esperantistoj.

Francio.

S-ro Archdeacon malavare donacis 1000 fr. al la esperanta federacio de Pariza regiono disdonotaj kiel premioj por konkurso inter lernantoj. Kunveno okazas ĉiuĵaŭde je la 20 h ½, 3, rue Thénard, ĉe Ecole des Travaux publics. Trapasantaj esperantistoj estas kore invitataj. D-ro Privat paroladis tie la 25. Decembro en plenega salono (120 p.).

La Centra Komitato de la „Ligo por la Homaj Rajtoj“, en sia kunveno de la 2ª de oktobro alprenis sekvantan decidon.

„La Centra Komitato, informiĝinte pri la cirkulero sendita la 3ªⁿ de junio 1922 de S-ro Léon Bérard, al la rektoroj ordonante“ averti la profesorojn kaj instruistojn sin deteni je ĉia esperanta propagando al la lernantoj „kaj peti“ la lernejestrojn nepre rifuzi, la pruntedonon de iliaj lernejoj al asocioj aŭ organizaĵoj kiuj ilin utiligus por organizi kursojn aŭ paroladojn pri Esperanto“;

Konsiderante ke S-ro Léon Bérard bazas lian decidon sur motivoj pedagogiaj kaj motivoj politikaj;

Ke la pretekstataj du motivoj ŝajnas montri ke S-ro ministro de Publika Instruado plene nescias la celon celatan de la esperantistoj.

Ke fakte Esperanto estis ĉiam konsiderita nur kiel helpa lingvo, servanta esprimi tre simplajn ideojn, helpanta ĉefe al komercaj interrilatoj;

Ke ĝi do ne povas malutili al la studo de lingvoj havantaj historian kaj literaturan estintecon;

Ke cetere, ĝia scienca kvalito estis konfesita de spertegaj lingvistoj;

Konsiderante ke mildigante la rivalecojn inter popoloj kiuj pretendis ĉiuj igi sian lingvon la internacian, la esperantistoj faras laboron de pacigo;

Konsiderante ke la Ministro de Publika Instruado permesas la laŭvolan instruon de religio, stenografio kaj danco en la liceoj,

Petas ke la cirkulero de la 3a junio 1922 estu nuligata."

Germanio.

La badenaj samideanoj kunvenis en Karlsruhe kaj fondis „Badenan Esperantan Laborunuiĝon". Ekzistas en teritorio Baden ĉirkaŭ 500 grupanoj. En tuta Baden oni malfermis tiun ĉi vintron 15 kursojn.

Hispanio.

La 10a Kongreso de la Kataluna Federacio okazos Paske (1.—3. aprilo) en Manresa.

Italio.

La „Laborista Esperanto-Grupo" en Ĝenova havas senpagan sidejon en la Laborborso. Laŭ sia statuto, ĝi ĉiam zorge konservis sian politikan kaj religian neŭtralecon, sed okaze de politika agitado, dum kelkaj tagoj la grupo ne povis kunveni, suferis viglan esploron, poste trovis sian sidejon malaranĝitan kaj feliĉe konstatis nur malgravajn rompiĝojn kaj mankon de dokumentoj kaj libroj. Pro tio, laŭ decido de ĝenerala kunsido tuj kunvokita, la grupo reproklamis sian neŭtralecon, renovigis sian dankesprimon al la estraro de la Laborborso kaj rekomencis sian agadon.

Jugoslavio.

Nia movado ricevis grandan moralan, oficialan subtenon de la progresema departemento por Instruo, de Kroatio kaj Slavonio: t. e. la oficialan diskonigon de la „Manifesto al la tutmonda instruistaro", de la Ĝeneva Konferenco.

Jen kopio de la cirkulero:

Landa Registaro por Kroatio
kaj Slavonio

Departemento por Instruado
kaj Kultoj

N-ro 25.252
1922

Por preso en la oficiala organo de la Registaro.

Cirkulero

de la landa registaro por Kroatio kaj Slavonio departemento por Instruado kaj Kultoj de 25a de oktobro 1922, N-ro 25.252, direktita al la tuta instruistaro de Kroatio kaj Slavonio, per kiu ili estas informataj pri la

Manifesto al la tutmonda instruistaro,

eldonita de la Internacia Konferenco de Instruistoj en Genève. *Sekvas la tuta teksto de la manifesto akceptita en la Konferenco la 20an de aprilo 1922 en Genève.*

En Zagreb, la 25an de oktobro 1922.

Por la landa Vic-reĝo
D-ro *Stjepan Bosanac,*
Reĝa Landa Lerneja Inspektoro.

Rumanio.

Granda publika manifestacio por Esperanto okazis en Timiŝoaro kun ekzameno de 50 kursanoj, prezento de esp. teatraĵoj de Baghi kaj Marie Hankel kaj aproba parolado de lernejinspektoro Burain.

Ameriko.

La Unua Kongreso de la Brazilaj Komercaj Asocioj, nun okazanta en Rio de Janeiro, ĵus aprobis la jenan rezolucion: „La Kongreso de la Brazilaj Komercaj Asocioj decidas konsili la instruadon de Esperanto en la komercaj lernejoj kaj la uzadon de tiu helpa lingvo en la rilatoj kun la eksterlandaj komercaj ĉambroj."

La Dua Amerika Kongreso de Ekonomia Disvastigo kaj Komerca Instruado, ĵus okazinta en Rio de Janeiro, unuanime rekomendis la instruadon de Esperanto en la komercaj lernejoj.

La Brazila Parlamento voĉdonis subvencion de 1500 milrejsoj (ĉ. 1000 sv. fr.) al Brazila Ligo Esperantista, jam rekonita publike utila laŭ dekreto N-ro 4356. 26. oktobro 1921.

Tiuj sukcesoj strange kontrastas kun la sintenado de la reprezentanto de Brazilo ĉe la Ligo de Nacioj.

Ĉiujara kunveno de membroj kaj delegitoj de UEA en London.

Vendredon, 24an de novembro 1922, okazis en la Londona Esperanta Klubejo, St. Bride's Institute, Bride Lane, E. C., la Ĉiujara Kunveno de UEA en London. Ĉirkaŭ 150 personoj ĉeestis. La ĉefdelegito de London, S-ro Philip Kay, prezidis, helpis lin S-ro Paul Blaise, komisionano de UEA, S-ro Robert Robertson, 1a Londona kasisto, kaj S-ro H. A. Epton, Londona Sekretario.

Malfermante la kunvenon, la prezidanto parolis kelkvorte pri la vespera programo, kaj petis S-ron Epton ke li legu la protokolon de la lasta kunveno, kion li faris.

Poste, S-ro Epton faris raporton pri lia aktiveco dum la pasinta jaro, kaj donis ekzemplojn de la diversaj servoj faritaj de li. La raporto estis aklame akceptita. S-ro Robertson parolis pri la Kombinita Kaso, fondita lastan jaron por helpi al la Londona kaj Centra Oficejo de UEA, kaj petis pluan subtenadon. S-ro Blaise tiam faris mallongan paroladon pri la nuna stato de la UEA, kaj pri la efektivigota nova internacia organiza movado. Li ankaŭ aludis malmultvorte al la valora laboro farita de UEA, rilate al la Ligo de Nacioj kaj la Internacia Labora Oficejo.

Post kelkaj demandoj, kiuj estis kontentige responditaj, la oficiala kunveno fermiĝis.

Tre bela kaj multŝatata koncerto tiam komenciĝis. Kantis F-ino Kathleen Stevens, ludis violonon S-ro H. Moy Thomas, kaj ludis pianoforton F-ino Frisby. Tre interesa kaj bone aranĝita komedio „La Amo, Ŝtelisto" (Molière) estis ludata de membroj de la „Dimanĉa Rondo."

Oni ankaŭ aranĝis dum la vespero Bazar-budon por helpi al la Konstruaĵa Kaso de Brita Esperantista Asocio. F-ino M. Rook tre gracie deĵoris pri tiu parto de la afero.

Post multe aplaŭdita voĉdanko al la „Dimanĉa Rondo" kaj al la aliaj ĝojigintoj, la kunveno fermiĝis.

TRA LA FILATELIO

Pro Juventute. La nunjara serio de kvar ekzempleroj montras la blazonon de kantonoj Zug sur la kvincentima, Freiburg sur la dekcentima, Luzern sur la 20 centima poŝtmarko. La 40 centima rec montras la svisan krucon, blanka kruco sur ruĝa kampo; la resto estas blukolora kaj blanka. Du figuroj de militistoj el la tempo de la batalo ĉe Sempach 1386



Ligo de Nacioj. La sekretariejo de la L. d. N. havas propran poŝtoficejon. Ĝis nun la senvaloriga stampilo portis la indikon „Société des Nations.“ De kelka tempo la poŝtmarkoj ĝis 1 franko uzataj ĉe la sekretariejo portas nigran surpreson „Société des Nations.“



Pac-konferenco en Lausanne. Speciala stampilo „Conférence pour la Paix en Orient“ memorigas pri tiu okazantaĵo.

Interŝanĝo de poŝtmarkoj kontraŭ svisa ĉokolado estas aranĝita de la Nansen organizaĵo. Ĝi proponis al la rusa komisariejo por ekstera komerco interŝanĝi 300.000 tavolojn da ĉokolado kontraŭ sama kvanto de stampitaj poŝtmarkserioj de ses diversaj valoroj. Post efektivigo de la unua provo devos okazi plia. La Helpa Komisiono por la malsat-regionoj instigas en la oficiala gazeto „Izvestija“ ĉiujn civitanojn de la sovjeta respubliko, kolekti kaj ensendi stampitajn markojn por helpi per la ricevota interŝanĝaĵo al la malsatantoj.

Laŭ „Prager Presse.“

Kolombo kaj la teleskopo. St. Kitts-Nevis. Poŝtmarko de brita kolonio portas bildon de Kristoforo Kolombo, staranta sur la ŝipestra ponto de sia karavelo kaj observanta la horizonton per granda teleskopo. La insulo St. Kitts-Nevis, apartenanta al la „Leewards Insuloj“ de la malgrandaj Antilioj havas ankaŭ la nomon St. Christopher; sendube estis intenco honorigi la grandan eltrovinton. Nur okazis erareto. La teleskopo aperis la unuan fojon preskaŭ 100 jarojn post la trovo de Ameriko. Laŭ F. S.

Novaĵoj. *Danzig.* Ju pli malgranda la teritorio despli multe da poŝtmarkoj. Surpresoj de 6 Mark sur 3 Mark (karminruĝa); 20 Mark sur 8 Mark (helblua). Kompletigo de la blazonserio per aldono de du valoroj de 6 kaj 20 Mark; la surpresitaj estis provizoraĵoj.


6 M
Deutsches Reich
4 Mark für Alters- und Kinderhilfe
12 M
Deutsches Reich
8 Mark für Alters- und Kinderhilfe

Germanio. Serio de 2 valoroj 6, 12 Mark kun aldonpago de 4 resp. 8 Mark uzota por helpi al bonfaraj organizaĵoj favore de maljunaj personoj kaj infanoj; ideo proksimuma kiel la Juventute pm. de Svislando.

Norvegio. Aperis nova pm. ŝajne la unua de nova serio. Purpurkolora subparto kun alte levita leono kaj hakilo; enskribo: „NORGE — 20 ÖRE — POST.“

San Marino: 10 centima (brunoranĝa), 15 centima (verda), 20 centima (bruna), 25 centima (ultramarina), 45 centima (ruĝa), 80 centima (blua).

Nederlanda Indio. Propagando-poŝtmarkoj eldonitaj okaze de foiro en Bandoeng, Java, per surpreso de la ordinaraj pm. de 1—20 ct. serio de 11 valoroj. Ili valoras ĝis 30. aprilo 1923. La markoj estas vendataj kun plipago.

Lingvaj Studoj.

Pri antikva vortfara metodo.

Estas konata maniero formi novajn mallongajn vortojn, kunmetante la unuajn literojn de la plena nomo aŭ titolo. Ni ja uzas UEA, LK, TEKA, ELA, KKK, ECO, ueano (almenaŭ buŝe), tekano, usonano, t. e. loĝanto de la „United States of North America“. La franca „le cégétiste“ signifas „membre de la Confédération Générale du Travail“, t. e. ano de konfederacio ĝenerala de laboro. Moderna rusa „Ĉeka“ estas mallongaĵo de la „ĉrezvyĉajnaja komissija“, t. e. eksterordinara komisiono. Ne estas ĝusta la opinio, ke tiu praktika metodo estas novaĵo elpensita en nia moderna tempo. Ni ĝin povas trovi ĉe pluraj malnovaj nacioj, en multaj antikvaj formuloj kaj nomoj.

La Talmudo nomas idolanojn per vorto *akum,* kiu restus neklarigebla por la semidologo, se oni ne konus ĝian devenon el la esprimo: *avde kohavim umazalot,* t. e. adorantoj de la astroj. La primitivaj kristanoj simbolis Kriston per la fiŝo, ĉar ĝia nomo helena estis: *iĥthys,* la kvin komencaj literoj signifas: *iesus ĥristos theou 'yios soter,* t. e. Jesuo Kristo Dia Filo Savanto. En la hindaj sanktaj libroj kaj preĝoj estas regule uzata mistika vorto *om* kiu estas fonetika simpligo de *aum* kiu siavice venis el la lastaj sonoj de nomo de la hinda triunuo: *Brahma-Viŝnu-Ŝivam.* La hindaj religiaj formuloj, nun fiksitaj en la Vedoj, estis kunmetitaj antaŭ la historia epoko, t. e. antaŭ pli ol 3000 jaroj.

Ekzemploj de tia vortfarado estas pli multaj ol oni ĝenerale opinias kaj ili ekzistas ĉe plej antikvaj popoloj. La leganto certe povos ilin trovi en sia lingvo, se li ilin serĉos kun iom da pacienco, kondiĉe ke lia lingvo estas pli-malpli literature ellaborita.

P. Stojan, LK.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO.

Celo: *Disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto. — Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo. — Krei internaciajn servojn uzeblaj de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio. — Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj. — UEA kunigas la samideanojn, kiuj per la forto de sia nombro kaj la utiligo de la Zamenhofa lingvo volas pruvi al la mondo, ke Esperanto vivas, taŭgas kaj progresas.*

Servoj: *Ĉiu membro rajtas peti informojn de la Delegitoj, uzi la servojn de la Asocio, senpage ricevi la Oficialan Jarlibron.*

Kotizoj: Oficialaj prezoj en svisaj frankoj. *Membro* (M) *5 Fr. Membro-Abonanto* (MA) *12,50 Fr. Membro-Subtenanto* (MS) *25 Fr.* La MA kaj MS ricevas la gazeton. — *Membro-Dumviva* ricevanta la gazeton kun ĉiuj oficialaj dokumentoj; *300 Fr.* (Partopagoj trijaraj po 100 Fr., sed neniu favora prezo kiel ĉe aliaj membro-kategorioj. — Naciaj prezoj por M, MA, MS:

Aŭstrio: Kr. 20, 40, 150 mil; **Belgio:** Fr. 10, 25, 50; **Britio:** Ŝil. 5, 12/6, 25; **Bulgario:** L. 45, 100, 400; **Ĉeĥoslovakio:** Kr. 18, 45, 90; **Danio:** Kr. 5, 12, 24; **Estonio:** Emk. 75, 150, 600; **Finnlando:** Fmk. 22, 60, 120; **Francio:** Fr. 10, 25, 50; **Germanio:** Mk. 2, 4, 16 mil; **Hispanio:** P. 6, 15, 30; **Hungario:** Kr. 750, 1500, 6000; **Italio:** L. 12, 30, 60; **Jugoslavio:** D. 22, 60, 120; **Latvio:** Lat. 1.50, 3, 12; **Litovio:** L. 1, 6, 24; **Nederlando:** G. 2.50, 6, 12; **Norvegio:** Kr. 5, 12.50, 25; **Polio:** Pmk. 4, 8, 30 mil; **Rumanio:** L. 45, 100, 400; **Svedio:** Kr. 4, 10, 20; **Usono-Kanado:** D. 1, 2,50, 5. — El aliaj landoj oni pagu laŭ la oficiala prezo en svisaj frankoj.

La helpmembroj (HM) kategorio kreita favore al jenaj landoj kun tre malalta monkurzo: Aŭstrio: Kr. 7000; Bulgario: L. 15; Estonio: Mk. 25; Germanio: Mk. 700; Hungario: Kr. 250; Latvio: Lat. 0.50; Litovio: L. 1 H; Polio: Mk. 1500; Rumanio: L. 15. La HM ĝuas ĉiujn rajtojn escepte la ricevon de la jarlibro, gazeto kaj enskribon en la interrilata adresaro.

La Entreprenoj de UEA (komercaj firmoj, societoj k. t. p.) pagas jare la oficialan aŭ nacian prezon kiel la MA. La Entreprenoj rajtas presigi tekston de 40 vortoj en speciala parto de la jarlibro kaj rajtas uzi la servojn de informpetado.

Centra Oficejo: *12, Boulevard du Théâtre, Genève (Svislando) — Bankkonto: Société de Banque Suisse, Genève. — Poŝtĉeko: I. 2310. — Poŝtĉeko en Ĉeĥoslovakio: No. 79 236, Praha. — Poŝtĉeko en Germanio: No. 908 50, Frankfurt am Main.*

Jarlibro 1923. — Pro la malfruiĝo en la forsendo de l' oficiala bulteno ni konsentas plilongigi la daton de ricevo de tekstoj enpresotaj ĝis 31. januaro 1923.

Plie ni informas, ke la prezoj de reklamoj fiksitaj por landoj kun tre malbona valuto povas esti pagataj en nacia mono laŭ meza taga kurzo.

La redaktado de la jarlibro forprenas multe da tempo; tial eble la korespondado pure administra iom prokrastiĝos. Ni petas paciencon kaj indulgon.

Averto. Ni ricevis plendon de S-ro Josef Popper, delegito en Žilina, Ĉeĥoslovakio kontraŭ la administracio de la gazeto „Nova Europo“ en Praha. S-ro Popper pagis al la nomita administracio 117 kronojn por du kotizoj de MA dum majo 1922. Post ripetitaj plendoj kaj admonoj la administranto de „Nova Europo“ respondis: ke ĝi estas paginta al nia komitatano, S-ro Hromada, ĉia pruvo pri tio mankas. Ni avertas niajn delegitojn kaj membrojn, ke estas rajtigataj akcepti kotizojn nur la personoj aŭ ejoj notataj en la Oficiala Bulteno aŭ Oficiala Informilo; la Centra Oficejo ne estas responda pri neregulaj pagoj kaj eventualaj sekvoj el ili rezultiĝantaj.

Laŭ jus ricevita informo la afero estas en ordo.

Garantia kapitalo.

Dua serio:

	Frankoj
Antaŭa listo:	9275.—
Akiris *kvaran* ateston de la unua serio S-ro G. Douglas Buchanan, Glasgow	100.—
	Fr. 9375.—

Statistiko de la poŝtajoj. Movado de la poŝtajoj dum novembro 1922: Ricevitaj: 537, forsenditaj: 563, entute: 1100.

Kotizoj por 1923. Je la 30ª de novembro estis enkasigitaj 36 kotizoj de Membroj, 120 de Membro-Abonantoj kaj 13 de Subtenantoj; sume 169.

Subtenantoj.

Unua listo:

1. S-ro J. Leakey, Greybole. 2. S-ro Adams, Hastings. 3. S-ro D-ro Rhys Jones, Cardiff. 4. S-ro F. Wright, Worthing. 5. S-ro Applebaum, Liverpool. 6. S-ro Lockyer, Liverpool. 7. S-ro Kunio Yanagita, Genève. 8. S-ro Schauenberg, Bruxelles. 9. S-ro Ch. Bardorf, Montreal. 10. S-ro M. Maldonado, San José K. R. 11. S-ro D. S. Tilly, Whangarei. 12. S-ro Wallace, Luisville. 13. S-ro Puig Rodon, Tucuman.

Delegitoj. Delegitoj estas elektitaj en jenaj lokoj:

Altenburg (Germanio, Sa.) — D.: S-ro Josef Major, elektroteknikisto, Hempel-Str. 44, II.

Aramon (Francio, Gard.). — D.: S-ro Léon Mathieu, lernejestro;
VD.: S-ro Charles Ruffin, kulturisto.

Balboa Heights (Panama, Canal Zone). — D.: S-ro Earle A. Young, P. O. Box 214.

Brignoles (Francio, Var). — D.: S-ro Honoré Bourdelon, profesoro, route du Val.

Frohburg (Germanio, Sachsen). — D.: S-ro Theodor Lötzsch, ministo, Schröterstr. 248 H.

Gronsdorf 17 (Germanio, Bayern). — D.: S-ro Heinrich Obermaier, librotenisto (Buchhalter).

Hilversum (Nederlando). — D.: S-ro J. F. E. von Römer, fervoja oficisto, Oude Amersfoortsche Weg 38.

Jerusalem (Palestino). — D.: S-ro Nathan Chavkin, grafika instituto;
VD.: S-ro Isaak Gurjan, komercisto, Nachlatshiva.

Kansas City (Usono, Mo). — D.: C. H. Gibbons, instruisto, 1841 East 7 th. Street.

Kénitra (Maroko). — D.: S-ro Charles Thollet, negocisto, 7, rue Albert Ier.

Letovice (Ĉeĥoslovakio, Moravio). — D.: S-ro E. R. Jelinek, tovarna Kosmonosy.

Lublin (Polio). — D.: S-ro Czeslaw Pruski, studento, Przemyslowa 25 loĝ. 9.

Rangoon (Birmanio). — D.: S-ro J. A. Johnston, komercisto, c/o Messrs. Binning & Co., P. O. Box 90.

Shanghai (Ĉinio). — D.: S-ro Hujucz, Eastern Miscellany Commercial Press.

Szombathely (Hungario). — D.: S-ro D-ro G, Halmagyi, polica kuracisto, Paragvari u. 18.
VD.: S-ro Jenö Török, presisto, Templom ter. 5.

Ujpest (Hungario). — D.: S-ro Ferenc Keder, medicina stud., Nydr. ut. 73.

Ŝanĝoj.

Genève (Svislando). — D.: F-ino Alice Diekmann, korespondantino, 66, rue de Lyon;
VD.: S-ro Rinaldo Borsa, instruisto, av. Pictet de Rochemont 15;

VD.: F-ino Yvonne Bouvier, sekretariino, Bd. des Tranchées 14.

Heidelberg (Germanio, Baden). — D.: S-ro Karl Link, bankoficisto, Pension Zeller, Theaterstr.

Krakow (Polio, Galicio). — D.: S-ro Bronislaw Kuhl, bankoficisto, ul. Batorego 1/II. p.

Montreux (Svislando, Vaud). — D.: S-ro Ed. Bellion, fervoja oficisto, rue des Alpes 3.

Venezia (Italio). — D.: S-ro Giuseppe Santin, tapetisto, S. Croce S. Giacomo dall' Orio 1661.

VD.: S-ro Giovanni Bonini, oficisto, S. Angelo, Calle Avvocati 3901 A.

La supraj elektoj fariĝas valoraj, se ĝis 30 tagoj post la nuna publikigo neniu membro protestas pro gravaj kaŭzoj. Intertempe la novaj D. kaj VD. agas provizore.

Provizore ne plu estas Delegitoj en jenaj lokoj: *Boone* (Usono); *L'Arbresle* (Francio); *Laren* (Nederlando); *Rosnay* (Francio); *Siedlce* (Polio).

* * *

Genève, 20a de decembro 1922.

H. Jakob,
Ĝenerala Sekretario de UEA.

Esperantista Literatura Asocio.

Januara raporto.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos

En Januaro 1923 denove aperas nia regularo. Ekzistas nenia kaŭzo por ŝanĝo aŭ aldono, ni konstante laboras laŭ la samaj principoj. Devas ekzisti loko, kien verkistoj povas sendi sian laboron, se ili deziras kontrolon. La gazetoj por tio havas siajn redaktorojn, sed la aŭtoroj de libroj ŝatos la servon de E. L. A. Ĉi tiun fojon ni povis prezenti en decembro nian nomaron. Kolegoj, kiuj deziras eliĝi bonvolu tion anonci, aliaj, kiuj longtempe ne pagis kotizon, tion afable nun faru.

Novaliĝintoj ne pagu denove en la jarkomenco. Oni sendu la kotizon en koverto al la administrejo, S-ino Hankel, Dresden, Nicolaistr. 18. Estas tre dezirinde, ke la kolegoj sendu 5 fr. aŭ similan sumon laŭ sia nacia mono. Angloj povas sendi 10 ŝ., pagante per tio por du jaroj. Germanoj pro la nuna valuto sendu 50 m.

Mallonga resumo el nia regularo sin trovas en la jarlibro de UEA 1922, p. 62. Ĝi reaperos en la nova eldono de 1923.

Regularo de E. L. A.

Motivo kaj celo.

1. Konatiĝo inter la verkistoj.
2. Reciproka helpo.
3. Evito de malhelpa konkurado, ekz. samtempa eldono de egala aŭ simila ellaboraĵo, duobla traduko de l' sama verko ktp.
4. Perfektigado de nia literaturo.

Ĉiu esperantisto povas fariĝi membro, kiu per libro, gazetartikoloj aŭ poemoj pliriĉigis nian literaturon.

Membro ankaŭ povas esti persono, kiu science, fake aŭ mone subtenas la asocion.

1. Jara kotizo, pagota en la komenco de l' kalendara jaro estas 5 fr., sendota en koverto laŭ ĉies nacia mono. Germanoj 50 m.
2. Korespondado per respondpago. (Respondkuponoj aŭ respondpoŝtkartoj.)
3. Fideleco al la Fundamento.

Raportoj aperos en „Esperanto", Ĝenevo.

Abono de la gazeto „Esperanto" ne estas deviga, sed tre varme rekomendata.

La administracio estas en Dresden, Nicolaistr. 18.
Prezidantino: S-ino M. Hankel.
Sekretariino: F-ino J. Zschepank.

La Nuernberga kongreskomitato invitas la anojn de la Esperantista Literatura Asocio. Ili vizitu la internacian kongreson la 2an de aŭgusto 1923, por ke ĝi fariĝu kiel eble plej impona. Ili baldaŭ aliĝu kaj ili legu la komunikaĵojn aperontajn en la esperantaj gazetoj.

„Elektitaj Rakontoj kaj Prozversaĵoj" de Elin-Pelin, konata bulgara beletristika verkisto, trad. de Iv. Krestanoff, baldaŭ aperos. S-ro J. Wuensch tradukis „Malamikoj en la Universo", novelo de Karlo Grunert, kun permeso de la eldonejo Franckh, Stuttgart. Prof D-ro Goehl intencas traduki „Kabale und Liebe" de Schiller. S-ro F. Steding tradukis poeziaĵojn el la germana lingvo, inter aliaj „La Sonorilo" de Schiller. S-ro J. C. Bunzl tradukis el germana lingvo „Literaturo" de Schnitzler. S-ro E. G. Collison tradukis laŭ la amerika verkisto Jack London „Rakonto pri Kiŝ."

Marie Hankel, Dresden, Nicolaistr.

Tra la Gazetaro.

Literatura Mondo. „Naskiĝis gazeto. Gepatroj, parencoj, konatuloj staras ĉirkaŭ la lulilo kaj penas, kun timema espero, diveni la sorton de la novenaskito.

„Alvenas D-ro okulvitro kun venena krajonlanco en la mano, vestita per malbonhumoraj recenzmanuskriptoj kaj grumblante, ektirinte sian longan barbon, li diris: „La infano ne estas vivkapabla, ĝi estas herede malsana, la gepatroj, ja suferas je peza malsano: la Gazetfonda Febro."

Tiel komencas la unua artikolo de la nova bele presita kaj ilustrita gazeto. Oni do ne povas taksi la eldonistojn je blindeco. Ni apliku al ili la proverbon „Sukceso ridetas al la kuraĝuloj" (audaces fortuna juvat). La unua n-ro kun riĉa enhavo kostas 1 fr. sv. (Budapest VI, Andrássy-ut. 81).

France-Esperanto aperas regule ĉiumonate kun literatura aldono, dank' al klopodo de la Centra Oficejo, 51 rue de Clichy, Paris. Ĝi estas bonega ligilo de la Francaj esperantistoj (abono: 6 fr. fr.).

Belga Esperantisto (N-ro 8—9) rakontas la historion de la „plej malnova Brusela burĝo": Manneken-Piss. La ŝatantoj de pitoreskaĵoj, kaj folkloro nepre devas posedi tiun n-ron!

La Policisto (Budapest) enhavas artikolon pri la danĝeroj kiuj minacas la policistojn: armitaj krimuloj, subaĉetoj, logo de virinoj kaj montras kiel severmoraj devas esti la policanoj.

Novaj Tempoj, revuo de Popoledukado havas novan adreson: S-ro Habert, 23 bis rue Morère, Paris 14. La lasta n-ro enhavas kiel kutime artikolojn pri edukado kaj speciale pri la ideoj pri ĝi de Francisco Ferrer.

Literaturo konatigas rimarkojn faritajn pri la instruo de Esperanto al 3½ jara rusa knabo,

Esperantista Parolejo.

Oni laŭdas!

Ni presigas en ĉi tiu senpaga rubriko dankojn nur pri gravaj servoj plenumitaj de delegitoj.

S-ro **Arthur Witham** en Burnley, membro 17.746 tre dankas la delegitojn en jenaj urboj, kiuj helpis lin dum trimonata vizito en Centra Eŭropo: S-roj Wilbert, Köln; Hans Fricke, Frankfurt; Alfred Petzold, Leipzig; Johann Klinger, Tetschen; prof. Josef Süsser, kaj Ernst Lederer, Saaz; Rudolf Novak, Plzeň; Milös Lukaš, Praha; D-ro Sós kaj R. Čech, Wien, kaj D-ro Richard Ledermann, Nürnberg.

Advokato **D. Theilhaber,** München, kore dankas pro gravaj servoj al librotenisto S-ro Paul Jakob Bendix, Amsterdam, kaj juĝoficisto Antonin Kudela, Olmütz.

S-ro **Victor Lluis,** membro n-ro 3809 en S. Feliu de Guixols (Hisp.) korege dankas S-inon Alice Farges, delegitino de UEA en Lyon (Francio) pro servo farita al li.

S-ro **B. Ludvik** en Kostelec n. č. l. sincere dankas por la helpo dum vojaĝo al S-ro Schwaiger en Berlin kaj al S-ro Selmer en Lübeck, kaj precipe al S-ro Lappalainen en Helsinki por afabla gastigado, loĝado kaj multaj servoj, al S-ro Petzold en Oschersleben por sincera akcepto kun sia familio.

La firmo **Vivamol Limited** en London utiliginte diversfoje la servojn de la delegitoj de UEA, publike dankas sekvantajn sinjorojn pro granda helpo komerca donita al la firmo rilate al trovo de agentoj, traduko de esperantaj dokumentoj en sia lingvo kaj aliaj servoj de delikata speco: S-roj Henning Halldor, D. en Stockholm, P. Lendorf, D. en København, E. Wanitsek, VD. en Bratislava, G. Puig-Mestre, D. en Santiago de Cuba, J. W. Sevenhuysen en Haarlem, R. Hromada, Komitatano en Praha, L. Drummond en Melbourne.

* * *

Bulgara Literaturo.

La tradukistoj de bulgaraj literaturaĵoj aperintaj en Esperanto-gazetaro bulgara kaj fremdlanda estas insiste petataj:

> indiki titolon, aŭtoron, gazeton, sian nomon, por prepari nomaron de la ĝisnune esperantigitaj rakontoj kaj versaĵoj el la bulgara literaturo aldonotan al aperonta „Bulgara Antologio“ kaj por eviti duoblan laboron.

Antaŭdankante mi restas samideane

Iv. Krestanoff,
Wintergartenstr. 9, Dresden-A. (Germanio)

* * *

Per Esperanto al la naciaj lingvoj.

Neniu alia afero estas tiel sukcesa por helpi la lernadon de fremdaj lingvoj kiel Esperanto. Lernante iun ajn lingvon, eĉ el la plej malgranda nacio, troviĝas samideano, kiu helpas nin por perfektiĝi. Ĉiam oni trovos inter la esperantistaro de la koncerna nacio amikon, kiu interŝanĝas iun ajn objekton kaj volonte liveras nacilingvajn gazetojn aŭ librojn, eĉ ekzamenos la laborojn kaj donos komplezeme respondon pri ĉiuj demandoj. Ne malofte oni trovos samideanon, kiu volas lerni mem la propran lingvon kaj tiam ekzistas la plej bona rimedo por perfektiĝi: oni vizitas unu la alian.

Por komunikigi samcelanojn fondiĝis Asocio kiu unuavice interŝanĝas gazetojn kaj peras adresojn por interŝanĝi librojn kaj aliajn objektojn rilate al la lernado de lingvoj. Plue la Asocio kolektas librojn por elprunti senkoste al siaj membroj bonajn verkojn en ĉiuj lingvoj.

Interesuloj bonvolu turni sin al

Gesellschaft für Schrift und Sprache,
Lindenstr. 10, Lübben N.-L. (Germanio).

* * *

Esperantistaj scienculoj, literaturistoj, artistoj kaj ĉiuspecaj fakuloj!

Trian fojon okazis dum la monato aŭgusto 1922ª, en la Monda Palaco en Bruselo, Internacia Semajnoduo, dum kiu diverslandaj scienculoj, literaturistoj, artistoj, venis paroladi pri temoj koncerne sian profesion. Ĉiuj ĉefaj lingvoj de la civilizita mondo estis uzataj por tiuj paroladoj. Dank' al la sindonemo de S-roj Paul Otlet kaj Henri Lafontaine, la kreintoj kaj organizantoj de la Semajnoduoj, Esperanto estis ankaŭ akceptita de la unua fojo (1920) inter tiuj lingvoj.

En 1920ª S-ino Cense, D-ro P. Corret kaj D-ro Vanvert; en 1921ª S-roj Gabriel Chavet, L. Demarcy kaj Muffang traktis temojn diverssciencajn por pruvi tiamaniere la praktikan uzeblecon de nia lingvo. Nunjare kvin paroladoj plej diverstemaj estas donitaj de F-ino Jennen kaj de S-roj L. Demarcy, M. Somerling kaj L. Cogen.

Ĉiuj antaŭnomitaj gesamideanoj estas ĉu francoj, ĉu belgoj. Estus tamen necese, ke, estonte, ankaŭ alinacianoj partoprenu la semajnoduojn por ne nur montri per la traktotaj temoj la taŭgecon de nia lingvo en ĉiuj kampoj de la homa agado, sed ankaŭ por pruvi la similecon, la unuecon internacian de Esperanto, je la vidpunktoj de elparolado kaj de uzado.

Tial la subskribintoj, kunvenintaj la 29ªⁿ de aŭgusto 1922ª en la Monda Palaco, ekstarigis Komitaton kun la celo, varbi por la estontjaraj semajnoduoj, diversnaciajn amiklandajn paroladontojn esperantistajn kaj esperas, ke la gesamideanoj komprenos la grandan gravecon de la akcepto kaj de la restado de nia lingvo en tiuj ĉiujaraj internaciaj manifestacioj de la spirita kaj arta vivo. Kaj kia nekomparebla kampo por la propagando inter la internacia intelektularo estas la Semajnoduo! Ili do faras varman alvokon al la amikaj gesamideanoj, kiuj intencas vojaĝi dum aŭgusto 1923ª al Bruselo por fari ian paroladon dum la venonta semajnoduo (ekzemple antaŭ aŭ post la tutmonda kongreso de Esperanto).

Ili invitas la fremdlandajn gesamideanojn por plenigi la Komitaton, reprezenti ĝin en siaj reciprokaj amikaj landoj kaj helpi al la varbado de paroladantoj.

La starigintoj de la Komitato por la varbado de Esperantistaj paroladantoj por la Internaciaj Semajnoduoj):

F-ino M. Jennen, S-roj L. Demarcy, Petiau, F. Mathieu, V. Hendricx, Fr. Schoofs, Grovermann, M. Somerling, J. Pirnay, L. Cogen.

P. S. — La Semajnoduoj komencas ĉiujare la antaŭlastan dimanĉon de aŭgusto.

Ĉiuj Esperantaj gazetoj bonvolu publikigi ĉi tiun alvokon, kaj sendi provnumeron al S-ro L. Cogen suprecititan.

* * *

Por praktika komerca uzado de Esperanto.

Mi konstatas ke via Revuo dediĉas grandampleksan lokon al literaturaj aŭ propagandaj artikoloj; lasu min diri al vi, ke, laŭ mia opinio, via vojplano devus esti tute alia. Tial ke via gazeto estas entute redaktita en esperanta lingvo, ĝi povas esti legata nur de esperanto-praktikantoj, kiuj ne plu estas konvertotaj. Do, por ili, la propagando estas tre malmulte utila; kaj, pri la esperantaj tekstoj, ili trovos facile iujn, konformajn al ilia speciala spiritformo, inter la multegaj libroj de la esperanta bibliografio.

Estas tute evidente ke kiel ĉefa celo, vi devas varbi al Esperanto personojn ne konantajn nian lingvon, montrante al ili ĝiajn praktikajn kaj profitdonajn uzojn.

Do, mi opinias, ke vi devas, antaŭ ĉio, gajni la simpation de la komercistoj; nun, nia lingvo estas sufiĉe disvastigita por ke vi povu doni al ili, helpe de ĝi, gravegajn komercajn informojn el la tuta mondo, kiujn oni malfacile povus alimaniere akiri.

Ŝajnas al mi ke vi povas kaj devas fari, en via revuo alvokon al ĉiuj esperantistoj el ĉiuj nacioj en la mondo, petante, de ili liston de la objektoj aŭ komercaĵoj kiuj estas superflue fabrikataj en iliaj respektivaj landoj, do eksterlanden eksporteblaj, kaj aliparte de la mankantaj artikloj, sekve importindaj, klarigante samtempe al la interesitoj la specialajn gustojn de iliaj nacioj.

Tiamaniere, vi tute trafe kunigos la oferton kaj la mendopeton; kaj certe en multaj fakoj, via perado povos fari gravegajn servojn. Kiam vi estos pruvinta, nur unufojon, vian utilecon havigante al iu komercisto kelkajn mendojn, li nepre estos konvertita al Esperanto, li fariĝos por vi profitdona reklama kliento kaj vi estos por li profitdona peranto.

Mi tre bone vidas, ke, en tre baldaŭa estonteco, via gazeto tute forlasos la propagandon lingvan kaj la literaturon por la multe pli efika propagando de komercaj reklamoj, legotaj kaj utiligotaj en la tuta mondo.

Do, mi ripetas ke vi devus kiel eble plej rapide fari alvokon al ĉiuj esperantistoj, por ke ili klopodu kaj sendu al vi kiel eble plej rapide, kompletajn informojn laŭ la ideoj ĉi supre difinitaj; kaj mi opinias ke vi eltiros el tiu sistemo multe pli da reklamo por Esperanto ol vi iam atingis per la plej elokventaj pledadoj lingvaj, aŭ per la plej interesaj rakontoj esperante redaktitaj.

Ernest Archdeacon.

* * *

D-ro Edmond Privat kaj liaj kunlaborantoj tutkore dankas pro ĉiuj ricevitaj bondeziroj okaze de la Novjaro kaj petas pardonon ke ili ne povas respondi aparte. Al ĉiuj sinceran dankon kaj feliĉigan jaron!

Esperantista Vivo.

Naskiĝoj. — Al Ge-roj *Cuny* en Paris naskiĝis filino nomita Raymonde.

Al Ge-roj *J. Aleksievi* en Varna (Bulgario) naskiĝis dua infano.

Edziĝoj. — F-ino *Sala Krotsztejn* kun S-ro *Chaim Bronsztejn* en Warszawa (Polio).

Niaj Mortintoj.

Kun bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj samideanoj. Al iliaj familioj ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

S-ro **Simeon Minĉev Baĉvarov,** patro de nia delegito V. S. Baĉvarov en Varna (Bulgario) mortis 83 jaraĝa en Gorna Orehovica. Li estis eksprezidanto de la grupo „Frateco“ malnova esperantisto kaj fervora propagandisto.

S-ino **de Ferrer** (membro n-ro 17.618) en Nice. Ŝi multe propagandis antaŭ 12 jaroj kaj ĉiam interesiĝis pri la movado.

S-ino **Anna Kopecká,** Praha VIII, patrino de nia delegito Rudolf Kopecký en Rosice apud Pardubice (Ĉeĥoslovakio) mortis 75 jara. Ŝi interesiĝis ĉiam pri la movado kaj la nobla ideo de Esperanto.

S-ino **Marie Notz,** bopatrino de S-ro Hans Jakob, ĝenerala sekretario de UEA, mortis 76 jara. Multaj precipe Bernaj samideanoj rememoros ŝian bonkorecon kaj afablan gastemecon. Ŝi estis cindrigita laŭ ŝia speciala deziro la 12an de decembro en Genève.

Generalo **Manoel Portilho Bentes,** membro n-ro 11.104, eksprezidanto de Brazila Klubo „Esperanto“, mortis en Rio de Janeiro. Li estis malnova kaj fervora samideano.

Redakteja Korespondo.

Al S-ro A. E. en F. — Vi demandas al ni ĉu la projektita unuiĝo de „Katolikaj komercistoj esperantistaj,“ ne povus naskigi similajn societojn kiel „Asocio de Filatelistaj Policanoj Esperantistaj“ aŭ „Ligo de hebreaj tramistoj esperantistaj“ aŭ „Unuiĝo de esperantistaj savarmeaj teknikistoj“ eble ankaŭ kun naciaj dividoj? Fakte la tri kvalitoj necesaj por aniĝi al tiaj societoj tiel malofte kuniĝus ke tiaj pliaj dividoj en la esperanta movado ne estus danĝeraj por la pli gravaj fakaj asocioj.

Al S-ro J. D. en L. — Kompreneble membro ne povas pagi laŭ la tarifo de alia lando kun malpli alta valuto. Tiuj favorprezoj ebligas al la membroj aliĝi al UEA, sed estas por ni gravegaj perdoj, ĉar ĉiuj niaj elspezoj, krom la gazeto, estas en svisaj frankoj.

Al S-ro M. D. en B. — Ni volonte akceptas ĉiujn interesajn artikolojn pri scienco populara, geografio, edukado, sociaj aferoj, literaturo kondiĉe ke ili estu neŭtralaj, klare verkitaj kaj legeble skribitaj, nur sur unu flanko de la papero.

Al S-ro W. Kn. en Beuthen. — Viaj proponoj estas interesaj kaj ni komunikas ilin ĉi tie: a) Delegitoj germanaj malfermu poŝtĉekkonton. b) La Centra Oficejo malfermu tian en ĉiuj landoj kie la servo ekzistas. c) Pago de poŝtelspezo kaŭzata al la Centra Oficejo kaj ne rilatanta al administra afero per poŝtĉekkonto, notante la demandon sur la detranĉo kiun la C. O. ricevas. d) presigo de la nomaro de membroj por kontrolo. Ni respondas: ne sole delegitoj germanaj malfermu konton ĉe la poŝtĉeko, sed ĉiu en kies lando ekzistas tiu aranĝo. Fakte jam multaj delegitoj havas tian konton. La Centra Oficejo malfermas poŝtĉekkonton nur en certaj landoj; dependas de certaj cirkonstancoj; la malfermo mem ne estas tiom simpla por entrepreno, havanta la sidejon en eksterlando. c) Ne ĉie la komuniko sur la detranĉaĵo estas senpaga; en Ĉeĥoslovakio ekzemple devas esti algluata 50 helera pm. Ni ŝatus se ĉe simplaj demandoj oni sendus duoblan poŝtkarton; la ŝparo estas ne preterlasinda. — Jam pluraj samideanoj instigis la represon de nomaro de la membroj: tiam la karaktero de la jarlibro forirus; ĝi estus nura *Adresaro* sufiĉe multekosta kaj eĉ ne fidinda. La adresŝanĝoj estas ekstreme multaj kaj ili senvalorigus la libron jam ĉe la presado. *H. J.*

ŜAKO

Gvidanto: *Fr. Hájek,* Praha-Nusle, Přemyslovo nábř. 396. Ĉeĥosl.

Ĉion kio koncernas ŝakon, sendu senpere al la gvidanto.

Problemo N-ro 53.

R. Svoboda, Praha.
(Originalo.)



Sinmatigo per la **4-a** movo.

Problemo N-ro 54.

† *Ph. H. Williams.*



Blanko matas per la **3-a** movo.

Problemo N-ro 55.

A. C. White.
(Good Comp., 1918.)



Blanko matas per la **2-a** movo.

Ludpozicio N-ro 56,

D-ro *Z. Mach,* Praha.
(Ĉas 10. 9. 1922.)



Blanko matas per la **2-a** movo.

Solvoj de la problemoj:

N-ro 50: 1. Tg3 — d3, Td1×d3, 2. f2 — f3†
Td1×e1, 2. Td3 — d4†
e2×f1, 2. De1 — e4†
Rh4—g4, 2. f2 — f3†

N-ro 51: 1. Dc8 — g4! tempo.
Dh5, 2. Kg6+, D×g6, 3. De6+, D×e6†
D×g3! 2. Te2+, De3, 3. Ĉf3! D×e2†
D×g5, 2. De6+, De5, 3. Th4! D×e6†

N-ro 52: a) 1. Tc5, P×c5, 2. D×b7†
b) 1. Kd7, D×d7, 2. Dd5, D×d5†
c) 1. Th5, K×h5, 2. Df5†
d) 1. Th5, K×h5, 2. Dd5, D×d5†

Alvenis ĝustaj solvoj de la problemoj:

N-ro 42 ĝis 45 Aŭg. Alksnits, Riga (Latvio); W. Erb, Itingen (Svis.); 46 ĝis 50 J. Kauder, Praha; 50, 52 O. Poláĉek, Praha; 50 V. Ĉánský, Praha (Ĉeĥ.); 47, 48, 49 b d Th. Rawlinson, Wavertree-Liverpool (Angl.); 46, 47 M. Esteban, Madrid (Hisp.); 47 S. Franz, Paris (Franc.)

Ludo N-ro 5, *franca defendo,*
ludita en Praha, la 12an de julio 1922.

Blanko: *V. Skřivan.* Nigro: *E. Richter.*

1. e2—e4 e7—e6
2. d2—d4 d7—d5
3. Ĉb1—c3 Ĉg8—f6
4. Kc1—g5 Kf8—b4
5. e4—e5 h7—h6
6. e5×f6 h6×g5
7. f6×g7 Th8—g8
8. Dd1—h5 Dd8—f6
9. Ĉg1—f3 Df6×g7
10. a2—a3 Kb4—e7!
11. Ĉc3—b5 c7—c6!
12. Ĉb5—c7+ Re8—d8
13. Ĉc7×a8 Tg8—h8
14. Dh5—g4 f7—f5
15. Dg4—g3 f5—f4
16. Dg3—g4 e6—e5

kaj Blanko rezignis. En la 10-a movo Nigro deflankiĝis de la kutima teorio, oferinte la kvaliton, kaj per sekvinta kombinaĵo gajnis la Damon.

REKLAMO

Nur anoncoj kun *samtempa* pago estas notataj. Ni akceptas la anoncojn laŭ la disponebla loko kaj ne povas garantii la aperon en difinita numero. Ni ne sendas pruvnumerojn kaj rekomendas al la anoncantoj aboni nian gazeton. Ni ne akceptas respondecon pri la sekvoj de anoncoj.

TARIFO.

Oficialaj prezoj en svisaj frankoj.

Korespondado: Unu enskribo (la adreso kaj ne pli ol 5 vortoj) Fr. sv. 0.75. — Por ĉiu plia linio (= 10 vortoj) Fr. sv. 0.50.

Petoj kaj Proponoj. — Internacia Komerco: Unu linio (= 10 vortoj) Fr. sv. 0.50.

Grandaj anoncoj: Unu kolono-larĝeco: Fr. sv. 2.00 po centimetro da alteco.

Naciaj prezoj por la 3 kategorioj.

Aŭstrio: Kr. 2000, 2000, 10000. **Belgio:** Fr. 1.50, 1.—, 4.—. **Britio:** Ŝ. -|6, -|5, 1|6. **Bulgario:** L. 10, 8, 40. **Ĉeĥoslovakio:** Kr. 2.50, 2.—, 7.50. **Danio:** Kr. 0.75, 0.50, 2.—. **Estonio:** Mk. 15, 15, 40. **Finnlando:** Mk. 5, 4, 12. **Francio:** Fr. 1.50, 1.—, 4.—. **Germanio:** Mk. 100, 100, 400. **Hispanio:** Pes. 1.—, 0.75, 2.50. **Hungario:** Kr. 75, 60, 250. **Jugoslavio:** D. 4, 3, 15. **Italio:** L. 2, 2, 6. **Latvio:** Lat. 0.30, 0.25. **Litovio:** Lit. 0.50, 0.50, 2.—. **Nederlando:** G. 0.35, 0.25, 1.—. **Norvegio:** Kr. 0.80, 0.60, 2.—. **Polio:** Mk. 300, 300, 1000. **Portugalio:** Esk. 2.—, 1.50, 5.—. **Rumanio:** L ,8, 6, 25. **Ruslando:** laŭ tarifo por Germanio. **Svedio:** Kr. 0.60, 0.40, 1.50. **S.vislando:** vidu oficialajn prezojn. **Usono kaj Kanado:** D. 0.15, 0.10, 0.40.

KORESPONDADO.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarkoj sur bildflanko.* k. ĉ. l. = *kun ĉiuj landoj.* Esp-aĵo = *Esperantaĵo.*

Atentigo!

La personoj anoncantaj havas la moralan devon respondi almenaŭ unufoje al la ricevitaj petoj, klarigante ĉu ili deziras aŭ ne deziris daŭrigi la korespondadon. Kiu ne respondas peton konforman al sia anonco, tiu malutilas al la internacia korespondado per Esperanto.

La plej korajn bondezirojn por la Nova Jaro
al ĉiuj gekonatoj kaj korespondantoj.
J. T. Kaptein, Dep. van Marine, Batavia, Nederlanda Indio.

☆ ☆ ☆ Bonan Novan Jaron ☆ ☆ ☆
deziras al siaj korespondintoj
Gustav Jönsson, Hellefors (Svedio).

Aŭstrio.

Bregenz-Vorkloster (Voralberg). — S-ro Adolf Neuwirth, mekanikisto, Rosenstr. 180, L, PI.

Eggenberg bei Graz. — S-ro Gottfried Schwarz, instruisto, Allee 46, PI, L, esp-gaz. kun Ameriko, Azio.

Wien VI. — S-ro Felix Märzendorfer, Gumpendorferstr. 39, PM k. ĉ. l.

Britlando.

New Barking (Essex). — S-ro H. A. Baldock, 10, Faircross Avenue, kun lernantoj en Centra-Eŭropo, Rusio, Siberio, Italio, L, PI.

Bulgario.

Gabrovo. — S-ro St. Ivanov, ul. Nikolaeuska 218, esp-gaz. kaj div. presaĵoj k. ĉ. l.

Varna. — S-ro Mihail Ŝekerĝief, ul. Haĝi Dimitre 29, L, PK, PI, PM, fot-aĵoj, vidaĵoj ktp.

Ĉeĥoslovakio.

B.-Kamnitz, Henne 475. — S-ro Anton Giebe, librotenisto, PI.

B.-Kamnitz 323. — S-ro Wilh. Wertner jun., PI.

B.-Kamnitz 35. — S-ro Franz Sieber jun., PI.

Gablonz a. N. — S-ro Hermann Röhlich, Wasserg. 7, PM k. ĉ. l.

Kukan b. Gablonz a. N., 308. — S-ro Adolf Wabersich, PI k. ĉ. l.

Moravany. — S-ro inĝ. L. Berger, interŝanĝas PI, PM, Esp-aĵojn, kolektas adresojn.

Praha — Kr. Vinohrady. — S-ro Jaroslav Franěk, bankoficisto, Třebízského ul. 8. Nur PM kun seriozaj filatelistoj. (L, PI, bfl.)

Želerná Ruda 1. — S-ro Karel Krča, PM k. ĉ. l.

Estonio.

Narva. — S-ro Vikt. Mander, 7es Peetri t. 12, PM kun neeŭropanoj, papermonon k. ĉ. l.

Finnlando.

Helsinki. — F-ino Fanny Mattsson, Museok 5 A, L, PI.

Helsinki. — F-ino Aino Järvinen, Greutzk. 8, L, PI.

Helsinki. — S-ro Paavo Laaksonen, Punavuorenk 22 C, PM k. ĉ. l.

Rauma. — Esp.-Klubo (30 gelernantoj) de Rauma instruista seminario, PI, bfl, ankaŭ L, PM, infandesegnaĵojn kun geseminarianoj kaj geinstruistoj de la tuta mondo.

Teuva. — S-ro V. Pitkänen, inĝeniero, PM.

Francio.

Levallois-Perret (Seine). — S-ro Antoine Plat, 106 Rue Gravel, PI k. ĉ. l.

Paris. — S-ro F. Brienne, 10, rue de Belzunce, PI, PM k. ĉ. l.

Germanio.

Berlin-Niederschönhausen. — S-ro F. Dyba, gimnaziprof., Körnerstr. 4. L kun instruistoj. Donos PM (flugpoŝtaj, oficaj, bavaraj ktp.) por 200—1000 alilandaj. Sigelu, rekomendu.

Breslau 18. — S-ro Hellmut Schmidt, Ahornallee 6, PI, bfl (panoramoj, humorkartoj) k. ĉ. l.

Dresden-Leuben. — F-ino Toni Heidig, Bahnhofstr. 30, L, PI, PM, esp-gaz. k. ĉ. l.

München. — S-ro D-ro Fr. Francke, Lindwurmstr. 145 I, PI (popoltipoj, naciaj originalaĵoj) kun negermanoj por kurso al realgimnazianoj.

Niedersedlitz. — S-ro Hans Jentzsch, Wilhelmstr. 16, PI, L, esp-gaz. k. č. l.
Wurgwitz-Dresden. — S-ro A. Woll, komercisto, 5, P, PI, L, PM, monerojn, monbiletojn kun eksterlando.

Hungario.

Budapest. — D-ro Károly Hegedüs, VI. Ankerköz, PM k. č. l.
Szombathely. — S-ro Eugĉno Török, Templom tér 5, PI, sporto, fotografaĵoj, papermono, G. M.
Szombathely. — S-ro Francisko Korányi, Körmendi ut. 38, L, PI, gaz., skolta movado, propagandiloj.

Italio.

Firenze. — S-ro Cav. Alberto Lesca, Piazza Vittorio Emanuelle 4, fotograf-poŝtkartojn, bfl, PM.
Firenze. — Capitano Decio Tianucci, Istituto Geografico Militare, PI, PM.
Livorno. — S-ro Emilio Cappellini, Via Solferino 33, PI, bfl.

Nederlando.

Amsterdam. — S-ro N. A. Zilver, P. O. B. 1055, PM, helpmono (malakceptas bagatelojn).
Helmond. — P-ro J. E. Mulder, Mielosche Weg 24, PM (kun seriozaj kolektantoj).
Vught. — S-ino G. van Heeswijk, Kloosterstraat, PM.

Pollando.

Inowrocław. — F-ino Danuta Czarlinska, Dworcowa 43, PI, PM, papermonon k. č. l.
Pabjanice. — F-ino Anna Kuratkowska, instruistino, Zamkowa 28, L, PI k. č. l.

Rumanio.

Targul-Mures. — S-ro Francisko Daróczi, studento, Ref. kolegio, PI, L kun fraŭlinoj, PM (sendu unue).
Teius-gara (Transilvanio). — S-ro Toader Adalbert, fot. kun fot-istoj, PM, PI.
Teius-gara (Transilvanio). — S-ino Helena Toader, PI (belartoj, fotografaĵoj, artaj nudaĵoj, gaz., propagandiloj).
Teius-gara (Transilvanio). — S-ro Adalbert Toader, poŝtoficejestro, PI, L, neuzitajn PM, librojn, esp.-gaz.

Ruslando.

Astrahan. — S-ro G. Artemjev, Armjanskij most 111, k. č. l., L, ĉiuteme, PM, PI, portretojn de gesamideanoj, esp. gaz., libroj, esp-aĵoj. Deziregas ricevi komercajn informojn, prospektojn, katalogojn por komerca informejo. Interŝanĝadon preferas nur seriozan kaj propagandan. Unue ne sendas.

Svedlando.

Falun. — S-ro Nils Lindvall, 22-jara gimnazia studento, PI, L k. č. l.
Malmö. — S-ro Sture Cronqvist, Claesgatan 12|I, PI, PM k. č. l.

Svislando.

Lugano. — S-ro Aloysio Cappello, Dir. de la Jurista Societo „La Difesa“, via Maghetti 2, PI, PK, PM, esp.-aĵoj kaj fotografaĵoj (sportoj, belartoj, pejzaĝoj ktp.).

Ameriko.

Buenos-Aires (Argentino). — S-ro José Catala, Calle Uriarte 485 Talleres F. C. S., PM rekomendite.
Buenos-Aires (Argentino). — S-ro Juan Navarro, Calle S. Martin 485 Talleres F. C. S. PM rekomendite.

Aŭstralazio.

Ballarat East (Victoria). — S-ro Joseph Mc. Conville, 237 Eureka St., k. č. l. L, PI, PM.
Melbourne (Aŭstralio). — S-ro A. D. Milne, State Savings Bank, Elizabeth St., k. č. l. (pri seriozaj temoj).
Semarang (Java). — S-ro Liem Tjong Hie, juna studento, Kranggan Wetan 19|21, k. č. l. gejunuloj L, PI, PM, tutaĵoj kaj parolaĵoj.

Azio.

Fukuoka (Japanio). — S-ro K. Munakata, Fukuoka kotogakko, 19-jara studento, PI, PM k. č. l.
Kioto (Japanio). — S-ro Takeo Karakaŭa, Dai - 3 - kotogakko, PI, PM, esp-aĵoj, monon k. č. l.
Taihoku (Japanio). — S-ro K. Takegami, 22, Tomon - cho (nur kun scienculoj pri parazitaj vermoj).
Teheran (Persio). — S-ino Moluk Mosaver Ŝagagi, Bulvardo Kaŝefos-Saltaneh, PI k. č. l.

JUNULA KORESPONDADO

Por ĉi tiu rubriko rezervata al junuloj maksimume 17-jaraj oni bonvolu indiki la aĝojn.

Kostelec n. cer. lesy (Ĉeĥosl.). — Gelernantoj 14-15 jaraj k. č. l. Skribu unue al B. Ludvík, f. instr.
Wurgwitz-Dresden (Germanujo). — S-ro Krumbiegel, instruisto kaj 40 infanoj, 12—15-jaraj, PI, L, PM kun eksterlando.

PETOJ KAJ PROPONOJ.

Aforismojn kolektas Van Doorne, Vliegerstraat 28, Rotterdam. Ankaŭ aĉetas kolektojn.

Alvoko: Por la propagado per Kinematografo de progresiĝo kaj utileco de Esperanto mi bezonas titolpaĝojn de ĉiuj esperantistaj presaĵoj — gazetoj, libroj, libretoj, afiŝoj — kiujn mi petas bonvolu sendi al mia adreso: Katowice (Polio), Holze ul. No. 2, II. Samtempe mi deklaras, ke tre danke pruntericevus ĉiun materion statistikan. Mi petas ĉiujn naciajn organojn ripeti la alvokon. A. Kobyliński.

Atentigo. La firmo Vivamol Limited en London atentigas pri S-ro Jovcev Varĉo en Kaŝlite, Gabrovo, Bulgario, kiu mendas komercaĵojn kaj post ilia ricevo per rekomendita letero, spite de multaj postuloj pri pago neniam skribas. (Ni konsilas al la komercistoj ĉiam peti antaŭan pagon. Red.)

„Batavo“ internacia, porkoresponda, porinterŝanĝa Societo, la sola eldonante brilan belege ilustritan organon, tute redaktitan en tri lingvoj (esperante, germane, france). Eksterordinare malaltaj abonprezoj. Ofertos al ĉiuj aliĝantoj senpagan unuan anoncon (15 vortoj) diversajn loteriajn konkursojn ktp. Delegitoj serĉataj en eksterеŭropo. Demandu informojn, prospektojn aŭ specimenajn gazetojn (po 40.— markoj aŭ 1.— franko por bonvalutaj landoj) ĉe S-ro Hans Wolf, Stuttgart, Hahnstr. 60.

Centrafrikaj kuriozaĵoj. Kontraŭ fr. Fr. 3.50 mi sendas feliĉ-braceleton el plektigitaj ĝirafharoj. R. Higot, Matadi (C. F. B. C.) Belga Kongolando.

Filatelistoj. Kontraŭ 2 sv. fr. mi sendos 1000 PM kun maloftaĵoj kaj 10 PI aŭ 100 belaj voĉdono-PM. Ŝanĝas ankaŭ kontraŭ antaŭmilitaj PM. Antaŭpago. Hellmut Schmidt, 18. Ahornallee 6, Breslau, Germ.

Filatelisto, kiu sendas al mi 100—500 poŝtmarkojn, al tiu mi sendos samvalorajn hungarajn markojn. Ne sendas unue. Zoltáno Székely, Budapest VII., Erzsébetkörut. 16.

Filatelistoj, kiuj sendas al mi 100-200 poŝtmarkojn de iliaj landoj, ricevos la saman kvanton da germanaj poŝtmarkoj. Otto Nitsche, Berlin O, Petersburgerstr. 46.

Filatelistoj. Danzig- kaj Memel-poŝtmarkoj pogrande por nom. kaj 25 proc., Germanujo por nom. kaj 10 proc. 100 diversaj PM de Danzig, Memel, Supra Silezio, Saar, Germanujo (nur aerpoŝto, têtes-bèches, surpreso ktp.) po 1 svisa franko. Kontraŭ reverencoj aŭ mondepeno mi sendas elektojn de serioj. Schultze, Rogzow bei Köslin (Germanujo).

Filatelistoj. Kontraŭ 10 sv. fr. mi sendos kompletan serion de rumanaj kronadaj PM. Toader Adalbert, Teius-gara, Rumanio.

Filatelistoj. Mi prizorgas ĉiujn kursirantajn (nestampitajn) germanajn PM kontraŭ pago de la nomvaloro plus 50 proc. kaj sendkostoj en germ. aŭ alia egalvalora mono. P. H. Herrmann, Potsdam, Margaretenstr. 23.

Filatelistoj. Sendu al mi per letero 25—100 PM malsamajn el via lando, mi tuj sendos al vi la samkvanton el Japanio. K. Munakata, Fukuoka kotogakko, Fukuoka, Japanio.

Germana gazet-korespondanto raportas konstante al eksterlandaj gazetoj pri ĉiuj aferoj, novaĵoj ktp. en Esp. kaj germ. Rich. Mahns, Schillerstr. 21, Röntgental b. Berlin, Germanio.

Helpu finigi sian studadon al lernantino de konservatorio suferanta je malvarmo kaj tro mizera por aĉeti lignon kaj muzikaĵojn. F-ino Lidia Vozdviĵenskaja, Ŝkolnij pereulok 6, Odessa, Rusio.

Kiun ajn okupon, kiu ne postulas la francan lingvon (almenaŭ ne tuj!) kaj la kuiradon kaj la kudradon akceptos kompense por la loĝigo kaj manĝado ĉeĥa fraŭlino. F-ino Josefa Gabrielova, Vršovice-Praha, Bulkarská 621, Ĉeĥoslovakio.

Maloftajn gazetojn „Rondiranto“ kaj „Lumo“ (aperintaj en Bulgario) grandformatajn, ilustritaj, same kiel multajn aliajn malnovajn, proponas je tre favora prezo: Iv. Krestanoff, Wintergartenstr. 9, Dresden-A., Germanio.

Oriento. Ĝi certe allogas vin! Se jes, tuj havigu al vi la bonstilajn interesplenajn verkojn pri la „Bulgara lando“ kaj „Pri la najbaraj landoj de Rusio“ kontraŭ rabatita prezo: 10 fr. fr., 2 h. Fl. aŭ 1 D. ĉe la aŭtoro: Iv. Krestanoff, Dresden-A. 16, Germanio.

Petu la libreton „Devoj de la Homo“ de Giuseppe Mazzini, kiu estas donace sendita de la „Laborista Esperanto-Grupo“ okaze de la 50a mortdatreveno de la Granda Itala Pensemulo; tamen por daŭrigi ĝi esperantan propagandon kaj dissendadon de la verketo, ĝi akceptas, antaŭdankante, libervolan monoferon (ĉu per nacia papermono, ĉu per ĉeko aŭ respondkuponoj) kiun afable oni sendos al jena adreso: S-ro Ettore Managlia, Cassella Postale 922, Genova (Italio).

Poŝtmarkoj. Sendu 100—120 diversajn PM de via lando kaj mi sendos la saman de mia lando. P. H. Herrmann, Potsdam, Margaretenstr. 23.

Sciencistoj. Mi proponas aranĝi grupon por fari vojaĝon tra Eŭropo kaj Ameriko por la scienca celo. Loko por kunveno estos Leipziga Foiro, marto 1923. Detaloj pri vojaĝo laŭ la adreso: Rostov-Don, Ruslando, Instituto Komerca, al S-ro A. T. Samojlenko.

Sendu 8 respondkuponojn kaj vi ricevos novan (4-an) eldonon de „BES-a adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj“ kaj rajtos senpage enskribiĝi en 5-a eldono. Prospekto senpage. Bohema Esperanto-Societo, Moravany, Boh., Ĉeĥoslovakujo.

Senkulpigoj. F-ino H. Alschwang en Lausanne petas siajn korespondantojn senkulpigi prokraston por respondo. Mankas tempo! En aprilo ŝi certe respondos al ĉiuj.

Virinoj! Bonvolu korespondi kun mi pri la virinaj rajtoj en la socio. Mi deziras ricevi libretojn pri la libereco de virinoj. S-ino Moluk Mosaver Ŝagagi, Bulvardo Kaŝefos-Saltaneh, Teheran, Persio.

INTERNACIA KOMERCO

Ĉiujn esperantaĵojn, nove eldonitajn, aĉetas aŭ akceptas por komisia disvendo „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Boh., Ĉeĥoslovakujo.

La Festpoemo de Helsinki de S-ro Kalocsay sur aparta memorfolio, la teatraĵeto *Paĝio de l' reĝino*, tradukita de Kalocsay, ludita dum postkongreso en Budapest, haveblaj por po unu respondkupono ĉe Paŭlo Balkányi, Budapest VI., Hajos u. 15.

Malmultekostaj belaj donacoj estas la hungaraj manlaboroj: brodaĵoj, puntaj kaj koloraj tuketoj, tukoj, ledaj saketoj, monujoj koloritaj, skatoletoj, pupetoj. Specimensendo por 20 sv. Fr. aŭ egalvaloro. Plej malgranda sendo por 3 Fr. Taŭga por revendado. Informojn donas kaj mendojn peras Paŭlo Balkányi, Budapest VI., Hajos u. 15. — La laborojn faras por vivsubteno hungaraj sinjorinoj kaj fraŭlinoj! Per mendo vi helpas ilin! La objektoj tre plaĉis al la vizitantoj de la kongreso en Helsinki!

Reprezentado. — Mi deziras reprezenti eksterlandajn firmojn pri ĉiuspecaj komercaĵoj. Mi povus aranĝi tenejon, akceptas komercaĵojn en komisio, donas komercajn informojn pri ĉiuj komercistoj el Rumanio. Toader Adalbert, Teluŝ-gara, Transsilvanio, Rumanio.

Rozoleo natura garantiite sendata poŝtasekurite en boteletoj de 10 gramoj neto por 30 fr. frankoj kaj 50 gr. 145 fr. senditaj per ĉeko al R. Červenakov, ulica Krestec N-ro 7, Sofia, Bulgario.

Ŝakludo kompleta. Arte tornitaj figuroj. Forsendo post antaŭa pago. Oni pagu per naciaj bankbiletoj. Prezoj: 6 svis. fr., 6 ŝil., 6 sved. k., 7 pes., 1.30 dol., 33 kč. Alois Kröll jun., Stalbach, Sinabelkirchen, Stirio, Aŭstrio.

Ŝelkoj
en plejbona kvaliĝo liveras kontraŭ antaŭa sendo de 2 svis. frankoj aŭ samvaloraj bankbiletoj en rekomendita letero.
Karl Kämpfe
Fabriko por ŝelkoj, ŝtrumpozonoj, metal- kaj ledozonoj por gesinjoroj.
Dresden-A., Haydnstr. 59.

Redakcioj, pretaj akcepti samtekstan anoncon, sendu oferton!

Societo Anonima
antaŭe
Ph. de Ruiter & Zoon
Culemborg (Holando)
fabrikas kaj eksportas ĉien
bonodorajn cigarojn.
Korespondas esperante.

ARCHIBALD SHARP
Fratulo de la Brita Esperanto-Asocio,
Asocia Membro Inst. Civilaj Inĝenieroj, Membro Inst. Aŭtomobilaj Inĝenieroj,
rajtigita patentagento
231, Strand, LONDON W. C. 2
volonte korespondos kun samprofesianoj alilandaj pri profesiaj aferoj,
patentoj, desegnoj, fabrikmarkoj
kun la celo disvastigi la uzon de Esp. en ilia intern. koresp.

Mendu tuj libron kaj alian presaĵon pure, rapide kaj malkarege ĉe
Presejo A. Berthold, Frohburg i. Sa. (German.)

Granda kolekto de poŝtmarkoj
estas aĉetebla. Ĝi enhavas ĉirk. 6000 divers. poŝtmarkojn de Eŭropo kaj kolonioj germanaj, bone ordigita, nur puraj pecoj. Prezo 900 dolarojn aŭ alia valuto konforma, de tie ĉi. — Ankaŭ **kolekto de PM seneŭropaj,** ĉirk. 700 divers., nur antaŭ 1914, kaj pli ol **kvin mil duobloj** — inter ili ĉirk. 1000 germ. poŝto en Belgio, etapregiono okcidenta kaj aliaj — estas aĉetebla por 200 dolarojn.
Informon donos la del. de UEA
S-ro **Cl. Rudert, Zwickau (Saks.),** Mühlpfortstr. 70.
Bonvolu enmeti sendkoston por letero.

L'Esperanto comme langue auxiliaire internationale.
Raporto de la Sekretariaro de la Ligo de Nacioj
unuanime akceptita
de la 3ª Ĝenerala Kunveno la 21ªⁿ de septembro 1922
(franca teksto).
Prezo: 10 ekzempleroj: 10 francaj frankoj.
Sendu la mendojn al UEA, Genève.

LA UNISMA FEDERACIO.

La Nova Edukada Movado por Mondpaco per Kooperativa Rekonstruado.

Por tiuj kiuj volas servi sen mona rekompenco.

* * *

Por starigi la multe deziratan mondpacon sufiĉas nek belsonaj esprimoj nek bonaj intencoj. Nun vere prezentas sin la okazo *por agi kooperative* en la politikaj kaj industriaj sferoj, ĉar internacia amikeco ne povus efektiviĝi antaŭ ol la diversaj landoj interne ĝuos paceman rekonstruadon. Ĉie kunhelpa sociala sistemo devas senprokraste anstataŭi la malkontentigon de hodiaŭ. Tiucele „La Unisma Federacio“ estas fondita laŭ la sekvanta difino:

> „Demokrato estas individuo kiu posedas opiniojn pri politikaj, industriaj aŭ aliaj aferoj, sed kiu samtempe konsentas ke aliuloj ankaŭ rajtas posedi kaj esprimi siajn proprajn ideojn. Same ĉiu nacio devas interrilatiĝi kun aliaj nacioj.“

La nova movado akordige kredas ke la partia sistemo de registaro iatipe estas senutila kaj nedezirinda dum la nuna krizo. Por fari uzon de la pluraj valoraj reformplanoj oni devas plibonigi la elektan maŝinaron kie necese per sistemo de proporcia reprezentado. Ĉi tiu aranĝo permesos ke ĉiuj politikaj grupoj kaj sendependularoj ricevu plenan kaj justan reprezentadon parlamentan. Plue ĉiuj grupoj rajtus partopreni en la funkcioj de la ministraro. Spertuloj, same kiel en Svislando, tamen devus kontroli la fakojn de la ŝtato.

Tia nepartia sistemo kompreneble bezonas kooperativan politikon rilate al la industrio. El la multaj skoloj de reformo estas sendube necese elekti simplan planon akcepteblan de la granda plimulto, kaj jen la utilo de la unisma idealo.

En la nuna tempo granda baraktado evidentiĝas inter la subtenantoj de la socialismo kaj la defendantoj de la individualismo. Tiuj volas enkonduki sistemon en kiu la komunumo iamaniere kontrolos la produktadon kaj la distribuadon; ĉi insistas por ke la industrio restu sub la kontrolo de privataj personoj.

Kompromison inter la du principoj estas deviga por eviti senecon kaj ĥaoson dum la kriza periodo de rekonstruado. La Unismo, kiel unuiga konstruema plano, liveras formulon:

a) La Individuo devas produkti.
b) La Komunumo devas distribui.

Alivorte la popoloj estas petataj interkonsenti pri la kontrolo de la industrio:

a) Estas permesate ke ĉiaj produktantaj industrioj estos starigitaj, organizitaj aŭ pligranditaj per privata mono-kapitalo kaj per la energioj de privataj individuoj aŭ grupoj. Tio signifas ke kooperativaj produktantaj societoj, sin kontrolantaj fabrikejoj, asocioj de produktantoj, privataj individuoj, publikaj akciaj kompanioj, naciaj gildoj, metiaj sindikatoj kaj aliaj tipoj povos daŭri eksperimenti. Tiamaniere solviĝos paŝo post paŝo la malsimplaj problemoj de interna organizado kaj de direkcia kapableco.

b) Estas decidite ke ĉiaj funkcioj de distribuado, konservado kaj transportado — kiel ebliĝos la sperto — estos komunume aŭ ŝtate kontrolitaj por fariĝi disdonada sistemo por senpartie helpi fabrikantojn kaj por efike servi la aĉetantan publikon. Kiel unua paŝo al la scienca organizado de distribuado — precipe de la ĉiutagaj necesaĵoj de la popoloj — oni povos kunigi kaj akordigi la rektajn disdonadajn metodojn de spertulo kiel S-ro Hoover kun la maŝinaro de la kooperativaj distribuadaj societoj. Libera interŝanĝado de komercaĵoj, en kaj ekster ĉiu lando, rapide disvolviĝos, kaj grava incitilo por militi tiel malaperos.

Post kiam komenciĝos la rekonstruado laŭ la unisma kompromiso, tiam la kunhelpa spirito estos pli preta por priparoli la aliajn diskutindajn reformojn koncerne la teron, la edukadon, la financojn k. a.

Sume mallonge, kiu volas aliĝi al La Unisma Federacio tiu fakte akceptos tri principojn:

1. Nepartia registaro bazita je reprezenta parlamento per proporcia reprezentado; spertula administracio.
2. Kunhelpa plano pri la kontrolo de produktado kaj distribuado dum la rekonstruada epoko laŭ la unisma formulo.
3. Libera esprimado de opinioj kaj zorga konsiderado de aliaj reformemaj politikoj.

Tial estas libera iu entusiasmulo fondigi senprokraste en sia distrikto grupon eĉ de nur tri anoj. Ĉiu grupo devas esti sendependa de ekstera aŭtoritato, kaj faros siajn proprajn regulojn kaj financajn aranĝojn. La komuna ligilo estos la dejorado diskuti, disvolvigi kaj uzi la unisman planon laŭ kondiĉoj lokaj aŭ naciaj ĝis kiam internacia kunligado ebliĝos por rapidigi la homaran interkonsenton.

* * *

Senpaga broŝurforma klarigo de la Unismo estas havebla de S-ro Colin Unwin, Box 47, Fremantle, Western Australia. (Poŝtkesto 47, Fremantle, Okcidenta Aŭstralio.) Pro la necerteco de poŝtaj aranĝoj kaŭze mondkondiĉojn la memstareco de grupoj estas precipe dezirinda. Ankaŭ oni devus peti broŝuron denove se ĝi ne alvenus ĝustatempe.

Esperanto-Presejo Paul Göring, Magdeburg-N